

Zofia Nałkowska

MEDALIONOJ



Eldonita de GEO
2015

Zofia Nałkowska

MEDALIONOJ

El la pola tradukis

Tadeusz Hodakowski

"HOMOJ AL HOMOJ PREPARIS TIUN ĈI SORTON"

Eldonita de GEO

2015

La Enhavo

[Profesoro Spanner](#)

[La fundo](#)

[La tombeja virino](#)

[Ĉe relvojo](#)

[Dvojra](#)

[La "vizo"](#)

[La homo estas forta](#)

[Plenkreskuloj kaj infanoj en Oświęcim](#)

[Klarigoj](#)

PROFESORO SPANNER

1

Tiun matenon ni estis tie duan fojon. La tago estis serena, maja, iom malvarma. De la maro venis refreŝiga vento, ĝi rememorigis ion de antaŭ jaroj. Post arboj de larĝa asfaltita aleo staris barila muro, post ĝi etendiĝis vasta korto. Jam ni sciis, kion ni estos vidantaj.

Ĉifoj akompanis nin du nejunaj sinjoroj. Tiuj ĉi venis kiel "kolegoj" de Spanner – ambaŭ profesoroj, ambaŭ kuracistoj kaj scienculoj. Unu alta, grizhara, kun vizaĝo malgrasa kaj nobla, alia same granda, sed krome grasa kaj pezstatura. Lia plena vizaĝo esprimis bonkorecon kaj kvazaŭ zorgoplenon.

Ili estis vestitaj sufiĉe simile kaj ne laŭ nia modo, kvazaŭ provinclandmaniere – en nigraj, longaj, printempaj paltoj el bona lano. Sur la Kapoj ili havis molajn, same nigrajn ĉapelojn.

Modesta, ne stukita dometo el brikoj staris en angulo de la korto, en flanko parto, kiel negrava pavilono de la granda domo, kie lokiĝis la Anatomia Instituto.

Unue ni malsupreniris en vastan, malhelan kelon. En oblikva lumo, venanta de malproksimaj, alte lokitaj fenestroj, la mortintoj kuŝis kiel hieraŭ. Iliaj korpoj, nudaj, blankokoloraj, junaj, similaj al malmolaj skulptaĵoj, estis en perfekta stato, malgraŭ ke jam de vico da monatoj ili ĉi tie atendis la momenton, kiam ili fine ne plu estos bezonataj.

Ili kuŝis kiel en sarkofagoj, en cementaj, longaj basenoj kun levitaj kovriloj – laŭlonge unuj sur aliaj. Ili havis la manojn mallevitaj laŭlonge de la korpo, ne kunmetitaj sur la brustoj laŭ la enteriga rito. Kaj la kapojn detranĉitaj de la torsoj tiel glate, kvazaŭ ili estus el ŝtono.

En unu de la sarkofagoj kuŝis sur amaso da mortintoj la jam konata „maristo" sen kapo – junulo impona, granda kiel gladiatoro. Sur la larĝa brusto estis tatuita konturo tle ŝipo. Tra la konturoj de du kamentuboj videbliĝis surskribo de vana kredo: Dio kun ni.

Unu post la alia ni preteriris basenojn plenajn de kadavroj, kaj ambaŭ fremdlandaj sinjoroj ankaŭ iris kaj ankaŭ rigardis. Ili estis kuracistoj kaj pli bone ol ni komprenis, kion tio signifas. Por bezonoj de la Anatomia Instituto ĉe la universitato sufiĉus provizo de dekkvar kadavroj. Ĉi tie da ili estis tricent kvindek.

Du kuvoj entenis solajn kapojn, senharajn, detranĉitajn de tiuj korpoj. Ili kuŝis unuj sur la aliaj – homaj vizaĝoj, kvazaŭ terpomoj deŝutitaj en kavon – kiel ili hazarde falis: unuj flanke, kiel oni kuŝas sur kuseno, aliaj turnitaj malsupren aŭ supren. Ili estis flavetaj kaj glataj, same bonege konservitaj, same glate detranĉitaj, kiel el ŝtono.

En angulo de unu kavo ripozis suprenturnite tiu negranda, kremkolora vizaĝo de knabo, kiu

mortante estis eble dekokjara. La oblikvaj, malhelaj okuloj ne estis fermitaj, la palpebroj apenaŭ mallevitaj. La diketa buso, de la sama koloro kiel la vizaĝo, alprenis esprimon de pacienca, malgaja rideto. La brovoj egalaj kaj klare desegnitaj leviĝis al la tempioj kvazaŭ kun nekredemo. En tiu plej miriga situacio, superanta lian komprenon li atendis la finan verdikton de la mondo.

Pli fore ree estis basenoj kun mortintoj, kaj poste kuvoj kun homoj tranĉitaj je duonoj, dispecigitaj kaj deŝiritaj de la haŭto. Nur en unu baseno, aparte kaj malproksime, kuŝis ne tro multaj kadavroj de virinoj.

Krome en la subterejo ni rigardis ankoraŭ basenojn, apenaŭ finkonstruitajn, sen kovriloj. Ili signifis, ke la provizo de la kadavroj, bezonataj de la vivantoj, estis nesufiĉa, ke ekzistis la intenco pligrandigi la tutan aranĝon.

Poste kun ambaŭ profesoroj ni iris al la ruĝa dometo kaj tie ni vidis sur malvarmiĝinta fajrujo grandegan kaldronon, plenan de malhela fluidaĵo.

Iu, kiu konis la terenon, iom levis la kovrilon, kaj per fajrohoko eltiris supren gutegantan per fluidaĵo, elboligitan homan torson senhaŭtigitan.

En du aliaj kaldronoj estis nenio. Sed en la proksimeco, sur bretoj de vitrita ŝranko, vice kuŝis elboligitaj kranioj kaj tibioj.

Ni vidis ankaŭ kestegon, kaj en ĝi tavolo metitajn – purigitajn de graso, maldike preparitajn pecojn de la homa haŭto. Sur breto – vazoj kun kaŭstika sodo, ĉe la vando – ni vidis – enmurigitan kaldronon kun mortero kaj grandan fornon por bruligi restaĵojn kaj ostojn.

Fine sur alta tablo – pecoj de blanketa kaj malglata sapo kaj kelkaj metalaj muldiloj makulitaj de la sekiĝinta sapo.

Ĉifoje ni jam ne supreniris per la ŝtupetaro la subtegmentejon, por tie rigardi la kraniojn kaj ostojn alte amasigitajn sur la argila pianko. Ni haltis nur por momento en tiu parto de la korto, kie estas videblaj la postsignoj de tute forbrulintaj tri konstruaĵoj, restaĵoj de metalaj fornoj de kremacieja tipo kaj tre multaj tuboj kaj kabloj. Oni scias, ke ankaŭ la ruĝan dometon oni ekbruligis jam dufoje. Tamen ĉiun fojon oni rimarkis la ekestantan brulegon kaj estingis ĝin.

Ni eliris kune kun la profesoroj, kiuj tuj apartiĝis de ni, kaj gvidataj de iu nekonata, iris sian vojon.

2

Antaŭ la Komisiono atestas homo juna, malgrasa kaj pala, kun klaraj bluaj okuloj, alkondukita por esplorado el malliberejo. Ne havanta ideon, kion ni volas de li.

Li parolas pripensante, serioze kaj malgaje. Tamen li parolas pole, nur kun iom fremda akcento.

Li diras, ke li estas el Gdańsk. Li vizitis popollernejon, poste li ankoraŭ finis ses klasojn de mezlernejo kaj faris la malgrandan ekzamenon de matureco. Li estis volontulo, li estis skolto. Dum la milito li falis en kaptitecon kaj forkuris. Li laboris sur strato ĉe neĝoforigado, poste en municia fabriko. Tie li ankaŭ forkuris. Generale ĉio okazas en Gdańsk.

Iu germano ekloĝis ĉe lia patrino, kiam oni prenis lian patron en koncentrejon. Tiu germano donis al li laboron en ĉi tiea Anatomia Instituto. Kaj tiel li venis al profesoro Spanner.

Profesoro Spanner verkis libron pri anatomio kaj okupis lin kiel preparatoron de kadavroj. En la universitato la profesoro faris prelegojn, tian preparatoran kurson por studentoj. Li eldonis sian libron, por tiu libro li laboris. Lia anstataŭanto, profesoro Wohlmann, ankaŭ laboris – tamen li ne povas diri, ĉu pri iu libro, aŭ nur tiel...

Tiu domo estis finkonstruita en la jaro 1943 kiel bruligejo. Spanner tiam prizorgis la maŝinojn por apartigado de karno kaj graso de la ostoj. El ostoj estis farotaj skeletoj. En la jaro 1944 profesoro Spanner ordonis, ke la studentoj demetu la grason de la kadavroj aparte. Ĉiuvespere post finiĝo de la kursoj, kiam la studentoj foriris, la laboristoj prenis telerojn kun la graso. Estis ankaŭ kun vejnoj kaj kun karno. Do la karnon ili forĵetis aŭ bruligis. Sed la homoj en la urbo plendis ĉe la polico, do tiam la profesoro ordonis, ke ili bruligu ĝin nokte, ĉar estis tro granda fiodoro.

Oni ankaŭ diris al la studentoj, ke ili deprenu la haŭton tute neta, poste aparte la grason, poste laŭ la preparatora libro la muskolojn ĝis la ostoj. La graso kolektita de la laboristoj de la teleroj restis poste kuŝanta la tutan vintron, kaj pli poste, kiam la studentoj forveturis, ĝi en kvin – ses tagoj estis prilaborata je sapo.

Profesoro Spanner kolektis ankaŭ la homan haŭton. Kune kun ĉefpreparatoro von Bergen li volis tani ĝin kaj ion fari el ĝi.

La ĉefpreparatoro von Bergen – tio estis mia senpera estro. La anstataŭanto de profesoro Spanner estis doktoro Wohlmann. Profesoro Spanner estis civilulo, sed li anoncis sin al la SS kiel kuracisto.

Kie nun estas doktoro Spanner, la arestito ne sciis.

– Spanner forveturis en januaro de la jaro 1945. Kiam li estis forveturonta, li ordonis al ni plue prilabori la grason kolektitan dum la semestro, li ordonis al ni bonorde fari la sapon kaj la anatomion kaj fari ordon, ke ĉio aspektu homece. La recepton li ne ordonis forigi, eble li forgesis. La poŝtaĵojn, post lia forveturo, oni sendis al li al Halle an der Saale, Anatomisches Institut.

Li sidis, atestante, sur seĝo apud la muro, kontraŭe al la fenestroj, en lumo. Li estas plene videbla – en siaj konsideroj kaj pripensadoj, en insista emo, rakonti ĉion precize, kiel ĝi estis, por preterlasi nenion. Li estas nur unu, kaj ni estas dekelkaj personoj: anoj de la Komisano, lokaj aŭtoritatoj, juĝistoj.

La troa fervoreco kaŭzas, ke kelkfoje li estas ne komprenata.

– Kio estas la recepto?

– La recepto pendis sur la muro. La asistantino, kiu devenis el vilaĝo, havigis de tie la recepton pri la sapo kaj skribis ĝin sur paperon. Ŝi nomiĝis Kojtek. La teknika asistantino. Ŝi ankaŭ forveturis, sed en Berlinon. Krom la recepto estis ankoraŭ noto sur la muro. Ĝin skribis von Bergen. Ĝi koncernis plenan purigon de ostoj por produkti skeletojn. Sed tio malsukcesis, la ostoj malboniĝis. Aŭ la temperaturo estis tro alta, aŭ la fluidaĵo tro forta – li embarasiĝis pro tiuj malnovaj zorgoj.

– La sapo laŭ la recepto sukcesis ĉiam. Nur unufoje ĝi ne sukcesis. Tiu lasta, kiu kuŝis en la bruligejo sur la tablo, ĝi ne estas bona.

La produktado de la sapo okazadis en la bruligejo. La produktadon direktis doktoro Spanner mem, kun la ĉefpreparatoro von Bergen. Kun tiu, kiu veturadis por havigi kadavrojn. Ĉu mi veturis kun li? Jes. Mi veturis nur dufoje. Kaj al la malliberejo en Gdańsk ankaŭ unu fojon.

Komence el frenezulejo oni liveris la kadavrojn, sed poste tiuj kadavroj ne sufiĉis. Tiam Spanner sciigis skribe ĉiujn urbestrojn, ke oni ne enterigu la kadavrojn, sed ke la Instituto sendos veturilon por preni la kadavrojn. Oni alveturigadis ilin el la koncentrejo en Stutthof, el Königsberg la mortpuntojn, el Elbląg, el tuta Pomeranio. Nur kiam oni funkciigis gilotlinon en la malliberejo de Gdańsk, tiam fine estis sufiĉe da kadavroj ...

Plejparte tio estis polaj kadavroj. Sed unufoje estis ankaŭ germanaj armeanoj, senkapigitaj en malliberejo dum solenaĵo. Kaj foje oni venigis kvar aŭ kvin kadavrojn kaj estis rusa nomo.

La kadavrojn von Bergen ĉiam alveturigadis nokte.

– Kia estis tiu solenaĵo?

– La solenaĵo okazis en la malliberejo. Inaŭguro de la gilolino. Estis invitita la ĉefo Spanner kaj diversaj gastoj. La ĉefo kunprenis la ĉefpreparatoron von Bergen kaj min. Kial li prenis min, mi ne scias, ĉar mi ne estis invitita. La gastoj venis per aŭtomobiloj kaj aliaj piede. Ili eniris tiun ĉambregon. Sed ni ne eniris tien, ni devis atendi. Ni jam estis rigardintaj la gilotlinon kaj pendigilon. Guste tiam estis tiuj kvar germanaj militistoj kondamnitaj al morto. Kaj laŭdire konsekris germana pastro.

Mi vidis, kiel oni enlasis unu malliberulon. La katenojn li havis malantaŭe, nudpieda, nigraj piedoj, nur pantalono, krome li estis nuda.

Estis violkolora kurteno, post ĝi alia ĉambro kaj prokuroro. La ĉefpreparatoro interparolis poste kun la ekzekutisto kaj rakontis ĉion. Do ili aŭdis la paroladon de la prokuroro, bruon, ian starigadon, piedfrapadon – kvazaŭ iu kurus. Kaj frapis fero. La ekzekutisto anoncis, ke la verdikto estas plenumita. Kaj jam ni vidis, kiel oni elportis kvar kadavrojn en malfermita cerko.

Ĉu estis pastro ĉe tiu inaŭguro, tion mi ne scias. Sed oni diris, ke unu militisto en uniformo estis pastro.

Je unu fojo von Bergen kun Wohlmann alveturigis cent kadavrojn el tiu malliberejo.

Sed poste Spanner volis havi kadavrojn kun kapoj. Li ankaŭ ne volis mortpafitojn, estis tro multe da laboro kun ili, ĉiam ili malbonodoris. Ekzemple unu germana soldato venis kiel mortkondamnito. Tiu havis rompitan kaj trapafitan kruron. Kaj li estis ankaŭ sen kapo. Ĉio kune. El la frenezulejo estis kadavroj kun kapoj.

Spanner ĉiam kaŝis kadavrojn por provizo. Ĉar se estis poste tro malmulte da kadavroj, tiam li devis jam preni kadavrojn sen kapoj. Tiu granda maristo sen kapo estas el la malliberejo de Gdańsk. La kadavroj estas tranĉitaj je duonoj tial, ĉar tutaj ili ne volis eniĝi en la kaldronon, ne povis lokiĝi.

Unu homo donas eble kvin kilogramojn da graso. La graso konserviĝis en la bruligejo en ŝtona baseno. Kiom?

Li pensas longe, li volas esti piej eble preciza.

– Unu kaj duona funto.

Tamen tuj li aldonas:

– Tiel estis antaŭe. Sed lastfoje estis malpli. Kiam ili komencis retiriĝi Germanujon, estis eble unu funto ...

Pri la produktado de la sapo neniu devis scii. Spanner malpermesis diri eĉ al la studentoj. Sed ili enrigardis tien, poste eble unu diris al la alia, do verŝajne ili sciis.

Kaj foje eĉ okazis, ke oni vokis kvar studentojn al la bruligejo kaj kuiris kune kun ili. Sed kutime aliron al la produktado havis la estro, la ĉefpreparatoro, mi kaj du laboristoj, germanoj. La pretan sapon prenis doktoro Spanner kaj li disponis pri ĝi

– La sapo preta? . . . Nu, kiam ĝi estas farita – ĝi unue estas mola, do ĝi devis malvarmiĝi.

Tiam ni devis ĝin tranĉi. . . Kaj Spanner enŝlosis la sapon. Tie estis ne nur la sapo, staris tie maŝino. Ni iradis tien kvinope. Kaj la aliaj devis peti pri la ŝlosilo, se ili volis eniri.

– Kial tio ĉi estis sekreto?

Pri tio li meditas pli longe. Li volas respondi laŭ sia piej bona scio.

– Eble Spanner timis aŭ io alia – li konsideras mediteme. – Mia opinio estas tia, ke se ekscius iu civilulo en la urbo, tiam eble ekestus pro tio ia komplikaĵo. . .

Povis ŝajni, ke ankaŭ ĉi tie ia „violkolora kurteno" estas pendigita inter ni kaj li. Ne estis rimedo por li.

Kaj fine iu demandis:

– Ĉu neniu diris al vi, ke la sapofarado el homa graso estas krimo?

Li respondis kun plena sincereco:

– Tion neniu diris al mi.

Tio tamen pensigas lin. Ne tuj li respondas pluajn demandojn. Fine li faras tion sen ia malemo.

– Jes, vere, diversaj homoj venadis al la Instituto kaj al Spanner. Profesoro Klotz, Schmidt, Rossman venadis al li. Foje la ministro de sano estis en la Instituto de Higieno kaj la ministro de klerigado, estis ankaŭ gaŭleiter Forster. Ilin akceptis profesoro Grossmann kiel rektoro de la tuta Medicina Akademio. Kelkaj estis, kiam tiu domo ankoraŭ ne staris, do ili vizitadis nur la anatomian fakon, esplorante, kia estas la anatomio, ĉu eble ne mankas io. Kaj kvankam jam ekzistis la bruligejo – nu, la sapo estis forigata ĉiam post kvar, kvin tagoj. Mi ne povas diri, ĉu ili vidis la sapon. Ili povis vidi. Kaj dum inspekto la recepto ĉiam pendis. Do, se ili legis, supozeble ili sciis, kion oni kuiras tie.

– Jes, la ĉefo ordonis al mi fari tiun ĉi sapon kun la laboristoj. Kial al mi? Mi ne scias. Pri Spanner, kiam li tiel ŝlosis la sapon, mi mem pensis, ke li faras ian finegocon. Se li estus skribonta en sia libro pri la sapo, li ne estus malpermesinta al ni paroli pri tio. Eble li mem venis al tiu ideo, ke li faru sapon el la restaĵoj? ...

Verŝajne li ne ricevis ordonon pri tio, ĉar tiam li ne devus klopodi pri la recepto ...

El tiuj konsideradoj rezultas nenia certeco.

– Kaj la studentoj? . . . Tiel kiel ni. Komence ĉiu timis lavi sin per ĝi... Abomenon oni sentis pri tiu sapo. Ĝi havis odoron nebonan. Profesoro Spanner tre zorgis, ke tiu odoro ĉesu. Li

skribis al kemiaj fabrikoj, ke ili sendu aromaĵojn. Sed ĉiam oni povis senti, ke ĝi ne estis tia ordinara sapo.

– Jes, mi diris hejme ... En la komenco eĉ unu kolego vidis: mi timtremis, ke oni povas lavi sin per ĝi. Hejme ankaŭ panjo naŭziĝis. Sed ĝi bone ŝaŭmis, do ŝi uzis ĝin por tolaĵlavado. Mi alkutimiĝis, ĉar ĝi estis bona ...

Sur lia malgrasa, paliĝinta vizaĝo aperas komprena rideto.

En Germanujo, oni povas diri, la homoj scias fari ion el nenio ...

3

Posttagmeze ni venigis ambaŭ maljunajn profesorojn kuracistojn, kolegojn de Spanner, por pridemando. La interparoladoj okazis en la limoj de ilia labortereno, en malplena ĉambro de unu el la malsanulejaj domegoj.

Ambaŭ – esplorataj aparte – deklaris, ke ili nenion sciis pri ekzistado de la domo entenanta kaŝitan fabrikon de sapo. Cimatene ili rigardis ĝin la unuan fojon kaj tiu vidaĵo faris fortegan impreson sur ilin.

Ambaŭ – esplorataj aparte – deklaris, ke Spanner, homo ne pli ol kvardekjara, estis scienca aŭtoritatulo en la fako de patologia anatomio. Pri lia morala flanko ili povis diri nenion, konante lin de mallonge kaj vidante lin malofte. Ili sciis nur, ke li apartenis al la partio.

Ĉiu atestanto sidis malproksime de ni sur apartigita seĝo, kun videbla deprimeco sur la vizaĝo. Ĉiu sidis, ne demetinte sian nigran palton, tenante per la manoj nigran ĉapelon sur la genuoj.

Ambaŭ parolis prudente kaj singardeme. Ambaŭ, parolante, ĉion prenis sub sia atento. Gdańsk en tiu maja sezono estis ankoraŭ plena de germanoj, tra la stratoj marŝadis trupoj de germanaj militkaptitoj, surŝutataj per floroj de siaj virinoj. Sed aŭtoritatoj estis polaj, kaj en la garnizono staris soveta militistaro.

Je demando, ĉu konante profesoron Spanner laŭ lia scienca agado ili povis supozi, ke li estas homo kapabla produktadi sapon el la korpoj de mortintaj punitoj kaj militkaptitoj, ĉiu tamen respondis alie.

Tiu alta kaj malgrasa kun la griza kapo kaj noblaj trajtoj, post pli longa pripensado deklaris:

– Jes, mi povis tion supozi, se mi sciis, ke li ricevis tian ordonon. Ĉar oni sciis, ke li estis disciplinema membro de la partio.

Kaj la alia – tiu grasa, pezstatura kaj bonkora, kun rozkolora vizaĝo kaj pendantaj vangoj – ankaŭ konsideradis longe. Kaj post medito – kvazaŭ ĉion konsiderante en sia konscienco – respondis:

– Jes, mi povis tion supozi. Nome pro tiu kaŭzo, ke la germanoj tiam spertis grandan mankon de grasoj. Do la konsidero pri la ekonomia stato de la lando, pri la bono de la ŝtato, povis inklini lin al tio.

LA FUNDO

– Do, kion unue mi rakontu al vi, sinjorino? – Ŝi meditas momenton. – Mi mem ne scias.

Ŝi estas grizhara, sufiĉe beleta, rondforma kaj mola. Ŝi estas tre laca. Ŝi travivis tiajn aferojn, kiujn neniu kredus. Kaj ŝi mem ankaŭ ne kredus, se tio ne estus la vero.

Al ŝi nenio gravas krom la bonvolemo. Nur tio, ke la homoj estu por ŝi bonvolemaj, ĉar ŝi multe travivis kaj ŝi estas patrino, kiu perdis du infanojn. Ŝi ne scias certe, ĉu ili mortis. Sed delonge oni ne scias, kio okazas al ili.

La filo ĝis nun ne revenis de militkaptiteco. Kaj tiuj kolegoj, kiuj revenas, diras, ke ili lin ne vidis. Kaj la filino...

Tio ĉi estas multe pli komplika afero, pro kiu vualiĝas per larmoj ŝiaj mildaj, grizaj, grandaj okuloj. Facile estas al ŝi eligi tiujn larmojn, kiuj aperas, kaj poste malaperas tute ne defluante sur la vangojn.

Pri la edzo ŝi ankaŭ scias nenion. Lastan fojon la homoj vidis lin en la tendaro en Pruszków. Sed li estis jam pli maljuna homo. Pli maljuna, kvankam tri jarojn pli juna ol ŝi. Ŝi estas tute sola kaj la homoj devus havi por ŝi ian bonvolemon. Pli maljunaj, kiuj ŝin ĉi tie memoras, jes, havas. Sed pli junaj pensas nur pri tio, ke ŝi ne baru ilian vojon.

– Do, kion unue mi rakontu al vi – ŝi ripetas, fermetante la okulojn pro laciĝo. En Ravensbrück, jes, oni nin turmentis. Oni torturis nin per injektoj, praktikis sur virinoj, malfermadis vundojn. . . Kaj tion faris iliaj kuracistoj, inteligentuloj. Sed tie ni estis nelonge, nur tri semajnojn. De tie oni prenis nin al alia "lager", al fabriko de municio.

– La filino ankaŭ. Jes. Ĉie mi estis ĝuste kun la filino. De la unua momento kiam oni nin arestis. Nur en la fino – revenante – ni perdiĝis dumvoje. Oni retenis ŝin kaj ankoraŭ kelkajn knabinojn, oni retenis. Eble estis deko da tiaj knabinoj . . .

Per voĉo iom mallaŭtigita ŝi eldiras multe da vortoj rapidaj, etaj, ŝutiĝantaj facile kaj malgaje. Estas multe da rememoroj pri la filino. Ŝi estis bona, estis beleta, estis kapabla. Ŝi instruis infanojn, apartenis al konspiracia organizaĵo. La filo ankaŭ. Ili ĉiam timis, kiam li revenis malfrue hejmen, longe post la polica horo. Li ĵetis sablon al la fenestro, ili mallevis al li ŝnuron kaj tiel li eniris tra la fenestro, ke la pordisto ne eksciis. Ŝi tremis pro timo, ke fine iu devos tion vidi, ke tio malkaŝiĝos.

Lin ankaŭ oni prenis, sed ne kune kun ili. Lin oni prenis dum la ribelo. Li skribis lastan poŝtkarton al la familio en januaro. Pri la patrino kaj fratino li sciis,, ke ili jam delonge estas en Germanujo.

– Antaŭ ol ni venis en la koncentrejon, ni estis du monatojn en la Pawiak-malliberejo. Kion ili tie faraĉis, kiajn krimojn al homoj! Injektojn, prenon de sango por soldatoj – kaj nur poste oni pendigis aŭ pafis. Neniam oni prenis sanan homon por pafmortigo, sed ili faris ĉion kun li antaŭe.

Estas evidente, ke ŝi prisilentas multon.

– Mi scias, ĉar ĉe ni en la kuirejo kuiris viroj, ili rakontis al ni. Hi ankaŭ diris pri tiuj ratoj ... La malliberigitaj mem devis matene elportadi kadavrojn el la pakkamero. La kadavroj kun manoj kaj kruoj ligititaj, havis elmorditajn intestojn. Al kelkaj ankoraŭ batis la koro.

Ree ŝi ekpensis pri tio, kion ŝi ne povis diri. Negranda sulko desegniĝis sur ŝia glata vizaĝo, pro tiu interna pensado.

– Min ili ne torturis tiom, nur ke ili min tre batis – ŝi diris fine.

Kaj ree ŝutiĝis ŝiaj iom mallaŭtigataj, rapidaj, etaj vortoj.

Ili terure batis min, ke mi diru, kiu venadis, kion oni faris tie ĉe mi, kiam estis tiu Sajna leciono de danco kaj kiam pianludis mia filino. Ili batis min per guma bastono . . . Kiam mi kaŝis la vizaĝon per manoj, ili batis al mi per bastono la fingrojn – jen ĉi tie, ankoraŭ estas videble. Kiam mi faras ion, tiam ankoraŭ doloras al mi ĉi tie.

Ŝi montris la manojn kun tuberoj, molajn negrandajn manojn, eluzitajn pro peza laboro.

– Mi timis terure, ke mi diros ion, kiam tro doloris al mi, kiam mi estis svenonta. Sed iel mi decidiĝis, iel mi obstiniĝis kaj mi diris nenion.

Ŝi eksopiris kviete kaj aldonis konfidence:

– Kaj ĉe ni la homoj lernis kaj havis bastonojn anstataŭ pafiloj. Mia filo instruis ilin.

Ŝi skuiĝis. Ŝi ŝovis preter la okuloj tiujn molajn misformitajn manojn kaj diris tiel:

– Kaj nun mi rakontos al vi, kiel estis, kiam mi laboris en la fabriko de municio. Tie ni havis ĉiutage dekdu horojn da laboro ĉe maŝinoj.

Ni dormis en lager. Tiu ĉi nova koncentrejo nomiĝis ŝajne Bunzig. De tie estis pli ol du verstoj al la fabriko. Ili vekis nin je la tria nokte, ne estis lumo, en mallumo ni ordigis niajn litojn, ni trinkis nigran kafon sen sukero kaj ni manĝis rapide tiun panon. De la kvara ĝis la kvina kaj duono estis raporto ekstere. Malvarmo, pluvo aŭ neĝo, ĉio egale. Poste duonhora vojo al la fabriko, por tien veni je la sesa. La tagmanĝon ili donadis al ni en la fabriko. Ĝi estis supo el folioj aŭ el io, mi ne scias klarigi tion – napo sekigita aŭ io simila. Matene kaj vespere nigra kafo sen sukero kaj krome dek dekagramoj da pano por la tuta tago. Unue ili

donadis dekkvin dekagramojn kaj poste jam nur dek – nu, ĝi estis tia peco. Do ni estis ĉiam malsataj. Terura estis la malsato.

Plejparte ni faris kuglojn kanonajn, aviadilajn kaj kontraŭaviadilajn. Tio estis peza laboro, ĉiam en fumo kaj varmego. Se iu ne faris sian kvanton, tiam ni estis torturataj.

– Kiel? Aŭskultu, sinjorino, en tiu lager estis bunkroj – aparte, malproksime. Tre malvarmaj, iom en la tero, kiel kelo. Se iu malbone ordigis la liton aŭ malbone lavis sian poteton de kafo, ĉar ne estis akvo kaj ja estis mallume – tiam ŝi devis iri en la bunkron. Aŭ ŝi devis stari dekdu horojn dum frosto aŭ pluvo. Gestapaninoj preteriradis, rigardis kaj priridis nin, ke ni frostas. Kiam ni alpremiĝis al ni reciproke por varmiĝi – do ili batis aŭ kondamnis nin al bunkra. Do ni devis stari en tiu malvarmo malproksime unu de alia. Ni havis somerajn robojn – ne niajn, ne. Niajn ili forprenis al ni. Estis ankaŭ strivestoj, ankaŭ tiaj kutimaj kun manikoj ĝis kubutoj, nudaj piedoj. Sur la dorsoj ni havis krucojn oblikve surkudritajn.

Dum tiu tempo dufoje oni razis al mi la kapon ĝis la haŭto kaj tiel mi devis iri en la froston. Nenion oni rajtis meti sur la kapon, ili tuj batis. Ŝuaĉojn oni donis al ni lignajn. Nur ĉe la piedfingroj estis alnajlita iom da papera teksaĵo, ke la ŝuaĉoj sin tenu. Ni havis tiajn grizbiuajn kruojn, kara Dio, kvazaŭ iu estus ŝmirinta ilin per bluiĝilo por tolaĵo.

Estis terure elteni tiun malvarmon. Kaj dumvoje, kaj en la fabriko ĉe la maŝinoj pli malfortaj mortis. La kadavrojn ili metis en la bunkrojn. Kaj ĝuste en tiujn samajn bunkrojn ili fermadis pro ĉiu piej malgranda kulpo, ili donis nenion por manĝi, ne permesis per io kovri sin, tutan nokton sur nuda tero. Nur matene ili vokis al la raporto, kaj post la raporto ree al la bunkro, sen ia manĝaĵo. Ne estis permesite doni manĝon, dum la raporto ili staris aparte, por ke iu ne dividu kun ili sian panon. La SS-virinoj tion tre gardis . . .

Ŝi ekhezitis, enpenŝiĝis. Jen estis io malfacile direbla.

– Tamen ili manĝis ion – ŝi diris pli mallaŭte. – Foje unu movis la buŝon. Kaj unu havis sangmakulitajn ungojn. Sinjorino, tio estis terure punata! Sed tie en la nokto ili manĝis viandon de tiuj kadavroj!

Nun ŝi eksilentis dum pli longa momento. Ŝi enpenŝiĝis, kvazaŭ ŝi volus aldoni ion. Sed ŝi ne povis. Ŝi skuiĝis.

La SS-virinoj estis kontentaj, kiam ni mortis – ŝi rakontis plu per pli certa voĉo, kvazaŭ ŝi venkus tenton. Kiam la virinoj estis mortintaj starante dum la raporto kaj falis teren, la SS-virinoj ne kredis, ridis, piedfrapis ilin, ke ili ŝajnigas. Ili piedfrapadis ilin, kiam – okazis ne unufoje – jam de kvaronhoro ili ne plu vivis. Oni devis do stari apude, oni ne devis moviĝi, oni ne rajtis doni ian helpon, nenion.

Se okazis, ke iu malsaniĝis, ili ankaŭ diris, ke ŝi ŝajnigas. Ankaŭ ili ĵetis ŝin en la bunkron,

ke ŝi tie mortu ĉe la kadavroj. Kaj la viroj havis ankoraŭ pli malbonajn bunkrojn, kiuj estis tute sub la tero. Ili devis en tiu malvarmo stari tie, ĝis la genuoj en akvo.

Ŝi sidis senmove, pripensadis, kion ŝi rakontu ankoraŭ. Kaj subite ŝi vigliĝis.

– Ankoraŭ ion mi diros al vi, sinjorino, ĝi certe interesos vin. Kiam ili, sinjorino, prenis nin tiam el la Pawiak-malliberejo, (tio estas tre interesa), ili donis al ni po unu panbulo kaj ni veturis al Ravensbrück en brutaj vagonoj. Po cent ili envagonigis nin, dense staris unu apud la alia.

Nek akvo, nek ebleco eliri, ni ĉion tiel starante, laŭlonge de kruroj. Kaj tiel ni dormis starante, ni ne povis sidiĝi pro la malvasteco. Kaj tiel ni veturis sep tagojn.

Dum la vojo oni starigis nin sur flankaj relvojoj. La vagonaro staris tri horojn. Tiam ni ĉiuj komencis hurli per nehomaj voĉoj pri akvo. Ĉar ili veturigis nin en tiu sigelita vagono dum varmego, kaj ni estis malsekaj de ŝvito, nigraj sur la vizaĝoj pro polvo, la vesto sur ni fiodoris, la piedojn ni havis malpurigitaj en ekskremento. Do ni komencis hurli kiel bestoj.

Tiam venis germana oficiro de alia vagonaro, kiu transportis vunditajn soldatojn, kaj ordonis malfermi la vagonon. Sed nin eskortis ukrainanoj. Ili diris, ke ne estas permesite, ĉar jen veturas banditoj. Tiam li alvokis aliajn oficirojn, car li estis scivola, kio estas tie. Ili deŝiris la plumbsigelon kaj malfermis la vagonon kaj tiam li ekvidis nin.

Sciu, sinjorino! Kiam li ekvidis nin, liaj okuloj fariĝis rondaj, la manojn li jen tiel disetendis pro teruro. Tiel li ektimis pro ni! Li aspektis kiel apro!

Nur post ia tempo li demandis nin, ĉu iu el ni parolas germane aŭ france. Multaj parolis. Do li tiam ordonis alporti al ni akvon kaj ellasi nin sur la relvojon, por ke ni reordigu nin. Ankaŭ tuj li ordonis malfermi la virajn vagonojn. Sed tie estis pli malbone. Ĉar ni estis nur mil kvincent virinoj, dum oni diris, ke viroj estis ĉirkaŭ kvar mil. Do ĉe ili en ĉiu vagono estis po tridek, kvardek mortosufokitaj!

Ŝi trankviliĝis eldirinte jam la piej interesan.

– Tiam ili ree plumbsigelis nian vagonon, kaj ĝis Ravensbrück jam malfermis al ni neniun. Neniu sufokiĝis, sed kelkaj frezeziĝis. Ĉu ili resaniĝis poste? Ne. Ne resaniĝis. Tuj la unuan tagon en Ravensbrück ili mortpafis ilin.

Kiam la virinoj frezeziĝis, tiam ili ĵetadis sin sur nin, mordis nin kaj taŭzis. Unu el ili, kiu nenion diris en la Pawiakmalliberejo dum piej severa esplorado, nun kriis laŭte nomojn de homoj, indikis lokojn, kie estas enfosita armilaro en kestoj, en kia arbaro, sur vojkruciĝo, en kia vilaĝo. Ŝi diris ĉion, kion ŝi nur povis rememori. Ni tiel timis, ke ŝi pereigos ĉiujn. Sed ili ne plu aŭskultis tion, nur mortpafis ilin unu post la alia. Ŝi malgajiĝis.

– Estas terure, ke mi ne retenis iliajn nomojn. Ĉar tie estis valoraj, meritplenaj virinoj. Eble nun la familio serĉas ilin, kiel mi serĉas miajn infanojn. Kaj mi ne povas rememori, kiuj ili estis.

Do vi vidas, sinjorino, vi vidas! Eĉ germano, eĉ li ektimis, kiam li ekvidis nin. Ĉu do estas mirige, ke la virinoj ne povis elteni?

LA TOMBEJA VIRINO

La vojo al la tombejo kondukas tra la urbo sub tiu muro. Ĉiuj fenestroj kaj balkonoj – antaŭe plenaj de malliberigitaj, kunpremitaj homoj, rigardantaj en la mondon de malantaŭ la muro – estas hodiaŭ senhomaj. Dum preterveturo jam delonge estas videbla sur iu dua etaĝo tiu sama fenestro ĉiam malfermita, kaj post ĝi pendanta stango kun nigriĝinta fenestra kurteno, seka floro en poto kaj ankaŭ ĉiam malfermita pordeto de malkara bufedo, staranta ĉe ĉambra muro.

Pasas monatoj kaj neniuj levas la kurtenan stangon, neniuj fermas la bufedan pordon.

La vojo al la tombejo malrapide ŝanĝiĝas de loko de vivantoj en lokon de mortintoj. Sed, ĉirkaŭita de malplena arkitektura kadro, tiu ĉi loko ankoraŭ ne tuta estas forlasita de ĉia vivo. Ĉar vivo jen estas aŭdebla, jen videbla.

Super la piej freŝa, juneta verdaĵo de tombejaj arboj – per nigraj nuboj leviĝas supren volvaĵoj de fumo. Foje trakuras ilin longa flamo, kvazaŭ mallarĝa, ruĝa, rapide flirtanta skarpo en vento. Super ĉio aŭdiĝas tra la ĉielo malproksima murmurado de aeroplanoj.

Pasas monatoj kaj tio ĉi ne ŝanĝiĝas, ĝi daŭras.

De ĉie venas sciigoj pri mortoj. Mortis P. en koncentrejo, mortis sinjoro K. en iu malgranda fervoja stacidomo, kaptita surstrate kaj forveturita. Homoj pereas ĉiel, laŭ ĉiuj eblecoj, pro ĉiaj pretekstoj. Ŝajnas, ke ne ĉiuj plu vivas, ke nenial oni obstinu, ke nenial oni persistu. Ĉie estas tiom da morto. En subteraĵoj de tombejaj kapeloj ĉerkoj staras vice kaj atendas sinsekve la tempon de sia enterigo. Ordinara morto, individua, ŝajnas esti io neĝusta, antaŭ la giganteco de kolektiva morto. Sed vivi estas afero pli hontinda.

Nenio el la malnova mondo estas vera, nenio restis. Al la homoj estas donite travivi aferojn superantajn kvazaŭ ilian nivelon. Teruro staras inter ili kaj baras ilin inter si reciproke. Ĉiumomente unu por la alia fariĝas okazo al morto.

La realeco estas tolerebla, ĉar ne tuta ĝi estas donita en sperto. Au donita ne samtempe. Ĝi atingas nin en fragmentoj de okazintaĵoj, en pecoj de raportoj, en eĤoj de pafoj, en malproksimaj fumoj disfluantaj tra la ĉielo, en brulegoj, pri kiuj la historio diras, ke "ili cindriĝas komplete", kvankam neniuj komprenas tiujn vortojn. Tiu ĉi realaĵo, fora kaj samtempe okazanta tutapude, ne estas vera. Kaj nur la penso pri ĝi penas ekposedi ĝin, senmovigi kaj ekkompreni.

Refoje ni iras la tombejan aleon. Nun okazas solena printempa festeno de mortintoj. Mortintaj jam delonge kaj per ordinara morto.

Ili diras nur sian antaŭnomon kaj nomon, ili diras daton, pli malofte ili rememorigas siajn profesion kaj titolojn. Iam dum preterpaso ili duonvoĉe petas pri sopirĝemo al Dio. Tio estas

ne multe. Ili estas tie ĉiam sur la samaj lokoj kaj diras ĉiam la samon, ili alparolas sindeteneme, ĝenataj de konvenoj. Ili vere volas tiel malmulte, ili ne trudas sin, ili devigas nin al nenio. Ili apenaŭ rememorigas pri si, al ili sufiĉas iomete da atento.

Instigon donas kelkfoje iu el la piej proksima familio – li kvazaŭ enkondukas kaj samtempe kuraĝigas. Iu sennoma edzino kun infanoj, "metanta al la edzo tiun ci memoraĵon", diras per ŝtona flustro, ke li estis la piej bona. Iu filino, siaflanke jam delonge ne plu vivanta, solene promesas per literoj verdaj pro musko sindonon al la piej amata patrino.

Tiu unu tombo estas sen kruco. Sur soklo de la bronza monumento oni surskribis vortojn hodiaŭ nekompreneblajn:

...RIGARDANTE DE L'ALTA POZICIO DE L'EVOLUO EN SENFINAN ABISMON DE L'ESTONTECO NI RIMARKAS TIE NE MALESPERIGAN KREPUSKON DE L'ETERNA MORTO, SED VIVIGAJN BRILOJN DE ETERNA KAJ ĈIAM PLIPOTENCIĜANTA VIVO.

Tra la spaliro de mortintoj proksimiĝas en tiu ĉi direkto virino zorganta florojn sur la tomboj. Ŝi havas en la manoj la emblemojn de sia posteno: balailon kaj verŝilon. La verŝilon ŝi starigas sur piata ŝtono ĉe fera puto kaj pumpas akvon en ĝin.

Sur tiu loko, jam proksima al la barilo, la tombejo tute dronas en verdaĵo, la tomboj kuŝas kiel mallongaj bedoj de malhelbluaj aŭ flavaj trikoloretoj. Floras kaj aromas konvaloj, jam post momento ekfloros siringoj. En verda aero vokas oriolo, kiel ĝi vokis ĉiuprintempe tie, ĉe la domo de la infanaĝo. Kampa muŝeto iras etpaŝe inter la trikoloretoj, grimpas sur iliajn tigojn, formangas ion.

En la trankvilon de larĝe malfermita ĉielo, super la tombejo ĉiun kvaronhoron malrapida aeroplano elfluas de la aerodromo kaj signante mildan duoncirklon foriras malantaŭ la murojn de la geto. Ne estas videblaj la bomboj ĵetataj en la trankvilo. Sed kiel postsignoj de ĝia traflugo post pli longa momento aperas longaj, mallarĝaj volvaĵoj de fumo. Poste videbliĝas ankaŭ flamoj.

La tombeja virino plenigis la verŝilon kaj foriris kun ĝi en la direkto de la floroj. Ŝi estas la sama, kun kiu oni parolas ĉi tie kelkfoje pri aferoj de la morto.

En la tempo de teruro oni venas en la tombejon kiel en solan lokon de trankvilo kaj sendanĝereco, kiel en ĝardeneton ĉe familia domo. Kiel al la piej certa adreso en tiu tempo.

Ŝi ŝancelis ankaŭ tiun mian certecon.

– Ĉi tie la tomboj estas pli bonaj – ŝi diris tiam. – Ĉi tie la tomboj estas pli bonaj, ĉar ĉi tie estas seke. La korpo kuŝas kaj ne putras, sed sekiĝas. Tie pli malsupre, kie estas malseke, la lokoj estas pli malkaraj. Tie nur du ĉerkoj povas kusi unu sur la alia.

Ŝi havis temperamenton serenan kaj senteman. Krome ŝi estis kompetenta, ŝi povis ĉiam servi per konsilo, kaj eĉ konsolo. Ŝi estis dikstatura kaj blanka, nenio tro impresis sin, por ĉio ŝi havis komprenemon.

– Kaj ĉi tie estas pli alte – ŝi diris. – Ĉi tie, kiam oni eltombigis unu mortintinon, ŝi estis ŝanĝiginta neniel. Ŝia edzo ordonis ŝin elfosi. Ŝi estis juna virino kaj estis enterigita en blanka robo. Do ankaŭ tiun robon ŝi havis sur si tute blanka. Kvazaŭ hieraŭ oni estus ŝin enteriginta.

Ne estis kompreneble, kial li ordonis elterigi ŝin. Ŝi klarigis tion tiel:

– Oni elterigis sin por proceso, ĉar li akuzis la kuracistojn en malsanulejo, ke ili ne gardatentis ŝin. Post la nasko de la unua infano, ŝi elsaltis tra fenestro kaj mortigis surloke. Kaj oni ŝin flegis nekonvene. Do oni eltombigis ŝin kaj veturigis al malsanulejo por sekco. Kaj poste oni reveturigis ŝin kaj enterigis. Sed ŝi ne plu havis sur si la blankan robon, nur bluan.

Oni enterigis ŝin, sed ankaŭ ne porlonge. Ne pasis tri monatoj, kiam oni ree eltombigis la ĉerkon.

– Kial?

– Tial, ĉar tiu edzo mortpendigis sin kaj oni devis enterigi lin. Oni pliprofundigis kaj masonis la tombon. Kaj nun ili kuŝas ĉi tie kune enterigitaj.

Kiel verdire la afero finiĝis kontraŭ la kuracistoj, ankaŭ ne estas klare. Evidente tamen ĝi ne kontentigis la pretendojn de la juna edzo, se li serĉis liberigon de sia sufero en la morto.

Poste venis tempo, kiam sur la tombejon faladis obusoj. Monumentoj kaj medalionoj rompitaĵoj kuŝis laŭlonge de la aleo. Tomboj kun malfermitaj internaĵoj montris siajn mortintojn en krevitaj ĉerkoj.

Sed la tombeja virino konservis sian denaskan trankvilon ankaŭ rilate al tiu afero. – Nenio fariĝos al ili – ŝi diris. Ili ja ne mortos duan fojon.

Tamen nun, kiam jen denove ŝi revenis por la akvo, estas videble, kiel ŝi estas ŝanĝiginta.

– Kio estas al vi? Ĉu vi estis malsana? Ŝia ronda, blanka vizaĝo nigriĝis kaj mal

grasiĝis, la frunto estas sulkoriĉa, kvazaŭ pro daŭra fortostreĉo, la okuloj brilas kiel en febro.

– Ne, nenio speciala estas al mi – ŝi diras malserene. – Nur, ke la homoj nun tute ne povas vivi ĉi tie.

Eĉ ŝia voĉo estas malforta, tremanta kaj pli mallaŭtigita.

– Ni ĉiuj havas la loĝejojn tuj ĉe la muro, tial ĉe ni ĉio estas aŭdebla, kio tie okazas ĉe ili. Jam nun ĉiu scias, kio ĝi estas. Ili pafas al la homoj sur la stratoj. Ili bruligas ilin en loĝejoj. Dum noktoj tia kriado kaj ploro. Neniu povas dormi, neniu manĝi, neniu povas elteni. Ĉu estas agrable aŭskulti tion?

Ŝi ĉirkaŭrigardis, kvazaŭ la tomboj de la malplena tombejo povus aŭdi ŝin.

– Ja ili estas ankaŭ homoj, do la homo ilin bedaŭras – ŝi klarigis. – Sed, mia sinjorino, por ni estas pli bone, se la germanoj ekstermos ilin. Ili pli malamas nin ol la germanojn...

Ŝi ŝajnis ofendita per miaj vortoj de naiva persvado.

– Kiel do, kiu diris? Neniu bezonis diri. Mi mem scias. Kaj ĉiu diros al vi la samon, kiu ilin konas. Kiam nur Germanujo perdos la militon, tiam la judoj murdos nin ĉiujn... Ĉu vi ne kredas? Eĉ la germanoj mem tion diras. Kaj la radio ankaŭ diris...

Ŝi sciis pli bone, por io ŝi bezonis tiun ĉi kredon.

Ŝi pli bone starigis la verŝilon sur la ŝtono ĉe la puto kaj denove komencis pumpi la akvon. Kiam ŝi finis, ŝi levis la kapon, ankoraŭ kolereta. Ŝi sulkgigis la frunton kaj maltrankvile ekpalpebrumis.

– Oni ne povas elteni, ne povas elteni – ŝi ripetis.

Per tremantaj manoj ŝi komencis viŝi de sia vizaĝo facilajn larmojn.

– La piej malbona estas tio, ke por ili estas nenia savo – ŝi diris mallaŭte, kvazaŭ timante, ke iu ekaŭdos. – Tiujn, kiuj sin defendas, ili mortigas surloke. Kaj tiujn, kiuj ne defendas sin, ili forveturigas per aŭtomobiloj same al morto. Do kion ili faru? Ili ekbruligas ilin en la domoj kaj al ili ne permesas eliri. Tiam la patrinoj envolvas la infanojn en ion, kion molan ili havas submane, ke ĝi rnalpli doloru, kaj elĵetas el la fenestro sur la pavimon! Kaj poste ili elsaltas mem... Kelkaj saltas kun la piej malgranda infano sur la manoj... Ŝi venis pli proksimen.

– Estis videble ĉe ni de unu loko, kiel patro estis elsaltanta kun tia pli malgranda knabo. Li estis persvadanta lin, sed tiu knabo timis. Jam li staris sur la fenestro kaj ankoraŭ tenis sin ĉe la fenestrokadro reziste al tiu patro. Kaj ĉu la patro puŝis lin, ĉu iel – tio ne estis videbla. Sed ambaŭ kune, falis unu post la alia.

Ree ŝi ekploris kaj per tremantaj manoj viŝis la vizaĝon.

– Kaj eĉ se tio ne estas videbla, ni aŭdas tion. Tio estas aŭdebla tiel, kvazaŭ io mola klakus. Klak, klak... Ili ĉiam elsaltas tiel, ili preferas elsalti. ol vive forbruli...

Ŝi ekaŭskultis. En la mola intervokado de la tombejaj birdoj ŝi estis distinganta

malproksimajn resonojn de korpoj falantaj sur ŝtonojn. Ŝi levis la verŝilon kaj foriris kun ĝi en la direkto de la flavaj kaj maihelbluaj trikoloretoj sur la tomboj. Tra la ĉielo estis alfluanta nova aeroplano el la direkto de la aerodromo kaj per granda arko ĝi direktis sin super la murojn de la geto.

La realeco estas tolerebla, ĉar ĝi estas konata ne tute. Ĝi atingas nin en fragmentoj de okazintaĵoj, en eroj de raportoj. Ni scias pri trankvilaj marŝoj de homoj irantaj sen kontraŭstaro al la morto. Pri saltoj en flamojn, pri saltoj en abismon. Sed ni estas sur tiu ĉi flanko de la muro.

La tombeja virino la samon vidis kaj aŭdis. Tamen por ŝi la afero tiel interplektiĝis kun la komentario, ke ĝi perdis sian realecon.

ĈE RELVOJO

Al tiuj mortintoj apartenas ankoraŭ unu, tiu juna virino ĉe la relvojo, kiu malsukcesis ĉe la forkuro.

Ŝi estas ekkonebla hodiaŭ jam nur en rakonto de la homo, kiu tion vidis kaj kiu ne povas tion kompreni. Kaj ŝi vivas ankaŭ jam nur en lia memoro.

Tiuj, kiuj estis veturigataj per longaj vagonaroj en sigelitaj vagonoj al koncentrejoj de ekstermado, kelkfoje forkuradis dum la vojo. Sed malmultaj havis la kuraĝon por tia forkuro. Tio postulis pli grandan kuraĝon, ol tiel veturi al certa morto, sen espero, sen kontraŭstaro kaj ribelo.

La forkuro sukcesis kelkfoje. En la surdiga bruo de la kureganta ŝargŭagonaro neniu de ekstere povis aŭdi, kio interne okazas.

La sola maniero estis la elrompo de plankotabuloj en la vagono. En la malvasteco de kunpremitaj homoj, malsatiĝintaj, fiodorantaj, la afero ŝajnis preskaŭ ne realigebla.

Estis malfacile eĉ moviĝi. La kunpremita homamaso, ĵetata de la rapidkura ritmo de la vagonaro, ŝanceliĝis kaj balanciĝis en sufoka odoraĉo kaj malhelo. Tamen eĉ tiuj – tro malfortaj timemaj – kiuj ne povis revii pri forkuro, komprenis, ke al la aliaj oni devas tion faciligi. Ili forkliniĝis, alpremiĝis al si reciproke, levis la piedojn malpurigitajn per fekaĵo, por malfermi al aliaj la vojon al libereco.

La sublevo de la tabulo ĉe unu flanko jam estis la komenco de espero. Oni devis deŝiri ĝin per kolektiva fortostreĉo. Tio daŭris horojn. Kaj tiam restis por deŝiro dua kaj tria tabuloj.

La piej proksimaj kliniĝadis super la mallarĝa malfermaĵo kaj retiriĝis pro timo. Oni devis kolekti la tutan kuraĝon, por – provante alterne per manoj kaj piedoj – elgrimpi tra la mallarĝa fendo super bruego kaj grinco de feraĵoj, en aerventego blovanta sube, super rapide preteriĝantaj subrelaj traboj – penatingi akson kaj en tiu alkroĉo tragrimpi per la manoj al tiu loko, en kiu salto donus verŝajnecon de savo. Elfali inter relojn aŭ tra inter radoj sur la randon de la relvojo – diversaj estis la metodoj. Kaj ocste rekonsciiĝi, falruliĝi de la surŝutaĵo kaj forkuri en fremdan arbaron, logantan per malheleco.

Homoj faladis sub la radoj kaj ofte pereis surloke. Pereis, frapite de elstaranta stango, de rando de klapo, ĵetite de impeto kontraŭ signalfoston aŭ ĉevojan ŝtonon. Aŭ ili rompintis brakojn kaj kruojn, elmetite en tiu stato al ĉiuj kruelaĵoj de la malamiko.

Al tiuj, kiuj ekkuraĝis malsupreniĝi en la bruantan, kuregantatan abismon, estis konate, al kio ili iras. Kaj estis konate ankaŭ al tiuj, kiuj restis – kvankam el la fermŝovita pordo same kiel el la alta fenestreto ne estis eble elkliniĝi.

La virino kuŝanta ĉe la relvojo apartenis al la kuraĝuloj. Ŝi estis la tria el tiuj, kiuj malsupreniris en la plankotruon. Post ŝi falruliĝis ankoraŭ kelkaj. En la sama momento super la kapoj de la vojaĝantoj aŭdiĝis serio da pafoj, kvazaŭ io eksplodadus sur la tegmento de la vagono. Kaj tuj la pafoj silentiĝis. Sed la veturantoj povis nun rigardi al la malhela loko de la elŝiritaj tabuloj, kiel al malfermaĵo de tombo. Kaj veturi trankvile pluen en la direkto de la propra morto, kiu atendis ilin ĉe la vojfino.

La vagonaro delonge malaperis en la mallumo kun sia fumo kaj bruego, ĉirkaŭe estis la mondo.

La homo, kiu ne povas kompreni kaj ne povas forgesi, rakontas tion ankoraŭfoje.

Kiam tagiĝis, la virino, vundita en la genuo, sidis sur deklivo de fervoja foso, sur malseka herbo. Iu sukcesis forkuri, iu pli fore de la relvojo, apud arbaro, kuŝis senmove. Forkuris kelkaj, mortigitaj estis du. Ŝi unu restis tia – nek viva, nek morta.

Kiam li trovis ŝin, ŝi estis sola. Sed iom post iom aperis homoj en tiu dezertejo. Ili alvenadis el la direkto de brikfarejo kaj el vilaĝo. Ili estis haltantaj timeme, rigardis de fore – laboristoj, virinoj, iu knabo.

Ĉiumomente formiĝis malgranda areto da ĉirkaŭstarantaj homoj, kiuj ĉirkaŭrigardis maltrankvile kaj rapide foriris. Venadis aliaj, sed ili ankaŭ ne estis haltantaj pli longe. Ili interparolis mallaŭte kun aliaj, ekĝemetis kaj iel interkonsiliĝis forirante.

La afero ne vekis dubojn. Ŝiaj krispaj, korvonigraj haroj estis distaŭzitaj en tro klara maniero, ŝiaj okuloj moviĝadis tro nigre kaj tro nekonscie sub la mallevitaj palpebroj. Neniu ekparolis al ŝi. Do estis ŝi, kiu demandis, ĉu tiuj, kiuj kuŝas ĉe la arbaro, ne vivas. Ŝi eksciis, ke ili ne vivas.

Estis hela tago, la loko malfermita, de malproksime ĉie videbla. La homoj jam kaŝeksciis pri la okazintaĵo. Estis tempo de pligrandigita teroro. Por dono de helpo aŭ rifuĝejo minacis certa morto.

Unu junan homon, kiu staris pli longe, poste foriris kelkajn paŝojn kaj ree venis, ŝi petis, ke li alportu al ŝi veronalon el apoteko. Ŝi donis monon. Li rifuzis.

Momenton ŝi kuŝis ferminte la okulojn. Ŝi ree sidiĝis, ekmovis la kruron, prenis ĝin per ambaŭ manoj, forŝovis de la genuo la jupon. Ŝi havis sangokovritajn manojn. Tiu ĉi mortverdikto kontraŭ ŝi, mortverdikto en ŝia genuo, restadis tie kiel najlo, per kiu ŝi estis alnajlita al la tero. Ŝi kuŝis longe kaj trankvile, la okulojn tro nigrajn ŝi forte kaŝis per la palpebroj..

Kiam ŝi fine malfermis ilin, ŝi ekvidis ĉirkaŭ si novajn vizaĝojn. Sed tiu juna homo staris

ankoraŭ. Tiam ŝi petis, ke li aĉetu por ŝi brandon kaj cigaredojn. Li faris tiun ĉi komplezon al ŝi.

La areto sur la deklivo de la remparo altiris la atenton. Ĉiam iu nova aliĝis. Ŝi kuŝis inter homoj, sed ne esperis helpon. Ŝi kuŝis kiel besto vundita dum easado, besto, kiun oni forgesis finmortigi. Ŝi estis ebria, dormetis. Ne forigebla estis tiu forto, kiu baris sin de ili ĉiuj per ringo de timego.

La tempo pasis. Maljuna vilaĝanino, kiu estis foririnta, sukcesis reveni. Ŝi spiregis. Ŝi venis proksime, prenis de sub la tuko kaŝitan ladan trinkpoteton da lakto kaj panon. Ŝi kliniĝis, rapide metis tion en la manojn de la vunditino kaj tuj foriris, por nur de fore rigardi, ĉu ŝi eltrinkos. Nur kiam ŝi ekvidis du policanojn irantajn de la urbeto, ŝi malaperis kaŝante la vizaĝon per tuko.

La aliaj ankaŭ disiris. Nur tiu ĉi unu malgrandurba spritulo, kiu alportis brandon kaj cigaredojn, ankoraŭ ĉiam estis kun ŝi. Sed ŝi volis de li nenion plu.

La policanoj serioze proksimiĝis por ekvidi, kio ĝi estas. Ili ekkomprenis la situacion, interkonsiliĝis, kion ili faru. Ŝi postulis, ke ili mortpafu ŝin. Ŝi intertraktis pri tio kun ili duonvoĉe, nur ke ili nenie sciigu pri ŝi. Ili ne povis decidiĝi.

Ankaŭ ili foriris, interparolante, ekhaltante kaj ree irante plu. Oni ne sciis, kion ili decidis. Fine estis certe, ke ili ne volis plenumi ŝian postulon. Ŝi rimarkis, ke kun ili foriris tiu afabla junulo, kiu donis al ŝi fajron por la cigaredoj per fajrigilo, kiu ne volis ekbruli. Kaj al kiu ŝi diris, unu el tiuj du mortigitoj apud la arbaro estas sia edzo. Ŝajnis, ke tiu informo estis al li malagraba.

Ŝi provis trinki la lakton, sed post momento enpenŝiĝinte ŝi formetis la trinkpoton sur la herbejon. Malrapide pasis peza, ventoplena tago antaŭprintempa. Estis malvarme. Malantaŭ la malplena kampo staris kelkaj dometoj, de la alia flanko kelkaj negrandaj, maldikaj pinoj balais per la branĉoj la ĉielon. La arbaro, en kiun ili estis forkurontaj, komenciĝis pli fore de la relvojo, malantaŭ ŝia kapo. Tiu ĉi dezertejo estis la tuta mondo, kiun ŝi rigardis.

La juna homo revenis. Ree ŝi trinkis iom da brando el la botelo, kaj li donis al ŝi fajron por cigaredo. Malpeza, moviĝanta krepusko ŝoviĝis sur la ĉielon de la oriento. En la okcidento volvaĵoj kaj strioj de nuboj leviĝis vigle supren.

Novaj homoj haltis, revenante de laboro. La antaŭaj klarigadis al tiuj novaj, kio okazis. Ili parolis tiel, kvazaŭ ŝi tute ne aŭdus ilin, kvazaŭ ŝi ne plu estus.

– Jen ŝia edzo tie kuŝas mortigite – diris virina voĉo.

– Ili forkuris el vagonaro en tiun arbareton, sed oni pafis al ili el pafilo. Oni mortigis ŝian

edzon, kaj ŝi restis ĉi tie sola. Oni trafis sin en genuon, ŝi ne povis forkuri plu...

– Se tio estus en la arbaro, estus pli facile forporti sin ien. Sed tiel, antaŭ homaj okuloj – ne estas ebleco.

Tion diris la maljuna virino, kiu venis pro sia lada trinkpoto. Silente ŝi rigardis la lakton verŝitan sur la herbejon.

Tiel do neniŭ deziris preni sin de tie antaŭ la nokto aŭ alvoki kuraciston, aŭ forveturigi al stacidomo, de kie ŝi povus veturi al malsanulejo. Neniŭ tia estis antaŭvidita. Temis jam nur pri tio, ke tiel aŭ alie ŝi mortu.

Kiam ŝi malfermis la okulojn dum la krepusko, estis ĉe ŝi neniŭ, krom la du policanoj, kiuj revenis, kaj tiu unu, kiu nun jam ne plu estis foriranta. Ŝi ree diris, ke ili mortpafu sin, sed ŝi ne kredis, ke ili :ion faros. Ŝi metis ambaŭ manojn sur la okulojn, por vidi nenion plu.

La policanoj ankoraŭ hezitis, kion ili faru. Unu persvadis la alian. Tiu respondis:

– Faru ĝin mem.

Sed ŝi ekaŭdis la voĉon de tiu juna:

– Nu, do donu al mi...

Ili traktis ankoraŭ kaj disputis. De sub iom levita palpebro ŝi ekvidis, kiel la policano prenis la revolveron el ingo kaj donis ĝin al la nekonato.

La homoj, malgrandare starantaj pli fore, vidis, ke li kliniĝis super ŝi. Ili ekaŭdis pafon kaj deturnis sin afliktite.

– Prefere ili povis alvoki iun, sed ne tiel... Kvazaŭ iun hundon.

Kiam fariĝis mallume, el la arbaro eliris du homoj, por preni sin. Pene ili trovis la lokon. Ili pensis, ke ŝi dormas. Sed kiam unu prenis sin sub la dorso, li tuj komprenis, ke ĝi estas kadavro.

Ŝi kuŝis tie ankoraŭ tutan nokton kaj matenon. Ne pli frue ol antaŭ la tagmezo venis la vilaĝestro kun homoj kaj ordonis sin forpreni kaj enterigi kune kun tiuj du, mortigitaj ĉe la relvojo.

– Sed kial li pafis al ŝi, tio ne estas klara – diris la rakontanto. – Tion mi ne povas kompreni. Ĝuste pri li oni povus pensi, ke li bedaŭris ŝin...

DVOJRA

Negranda virino kun nigra vindeto sur okulo ekstaris ĉe la vendotablo. Ŝia same malgranda kaj iom stranga akompananto kun nigraj lipharetoj postulis okulvitrojn por ŝi.

– Dum pluraj jaroj tiu ĉi sinjorino ne uzis okulvitrojn – li diris signifoplene kaj bonvoleme.

– Kial?

– Tial, ĉar ŝi estis en koncentrejo. Koncerne la okulon evidentiĝis, ke ĝi ne estas konvena. Ĝi estas tro granda kaj ne volas eniri. Kaj pro la okulvitroj oni devos veni ankoraŭ morgaŭ.

– Ĉu vi volus iom interparoli kun mi? Ni povus eniri en apudan sukeraĵejon.

Ŝi ekmiris. Ŝi ne povis iri en la sukeraĵejon. Ŝi estis okupita. Ŝi devis reveni al la loĝejo, ĉar ĝi estas ŝlosita, kaj la ŝlosilon ŝi havas kun si. Al la loĝejo, kie ĝuste antaŭ du tagoj ŝi trovis okupon.

Do ni iras kune tra la larga strato de Praga. Kaj tra malluma pordego ni eniras en kortegon de granda domaĉo kun malpuraj, nigriĝintaj muroj kun defalinta surkalkaĵo. Profunde en angulo, malantaŭ senkoloriĝinta bruna pordo, komenciĝas krepuska koridoro.

– Ĝi estas sur tria etaĝo.

Ligna ŝtuparo kondukas alten senhalte en mallumo. Oni devas teni sin al la balustrado, atente elpalpi per la plandumoj breĉojn en la plankaj tabuloj por ne fali. Fine sur la unua etaĝo ĉesas ĝia daŭra kontinuo. Glata tabularo de la pianko kondukas ree al loko, kie super la antaŭa komenciĝas nova ŝtuparo kaj denove per unu longa kuro atingas la duan etaĝon.

Ce la enirejo al la tria etaĝo ni staras momenton apud fenestro. Ni rigardas al la granda, malhela kaj malpura korto.

– Kian okupon vi havas?

– Mi purigas kaj gardas la loĝejon. Ĉar en tiu loĝejo estos juda ambulatorio.

– Do ĉu vi trovis viajn homojn? Ĉu vi havas zorgantojn kaj amikojn?

– Mi estas sola – ŝi respondis rapideme. Mi estas sola – ŝi ripetis ankoraŭfoje.

– Tamen tiu sinjoro, kiu foriris, aĉetis por vi la okulvitrojn. Kaj la okulon.

Pri tio ŝi pene konsentis.

– Jes, ili aĉetos al mi la okulon. Kaj ili volas eĉ zorgi pri kompletigo de la dentoj. – Ŝi ekhezitis kaj peze konfesis: – Sed tio ne estas la familio.

Ni iras jam la lastan etaĝon kaj ree ni revenas tra glata tabularo, ĉirkaŭigita de ligna balustrado. En la loko, kie sur la pli malsupraj etaĝoj estas fenestroj, sur la tria etaĝo malfermiĝas senkoloriĝinta, malfirma vitrita pordo. Ĝi kondukas al penda, ligna koridoro havanta balustradon, alkroĉita al la muro kaj krakanta super malplenaĵoj.

Ni haltas ĉe la tria pordo, fermita kvazaŭ per fenestra tabula kovrilo.

– Jen ĉi tie – ŝi diras.

Ŝi prenas ŝlosilon kaj malŝlosas grandegan pendoseruron enmetitan en riglohokon. La pordo malfermiĝas al vasta, malplena loĝejo. Unu malplena, malserena ĉambro, kun lavita pianko, la alia ankaŭ ordigita, kun malalta kuŝejo apud la muro. En la tria – tablo apud muro, unu seĝo kaj dua.

– Ho, ĉi tie ni povas interparoli. Sidiĝu, sinjorino.

Ni eksidas vidalvide al ni ĉe angulo de tiu tablo.

– Ili estas bonaj. Sed tio ne estas mia familio – ŝi ripetas. – Mi havas neniun. Mia edzo estas mortigita en la jaro 43 en stacidomo Małaszewicze, ok kilometrojn de Brześć Litewski. En lager. Estis miloj da mortigitoj, car ili tiel mortigis ĉiun dekan, ili mortigadis ĉiujn kelkajn tagojn. Ne, mi mem ne vidis tion, sed mi aŭdis pri tio. Ĉar mi ne estis tie, mi estis en Międzyrzec. Kaj tion mi scias, ke en la jaro 42 mia edzo estis ankoraŭ viva. Ĉar tiam germana aviadisto prenis leteron al la edzo kaj estis respondo je tiu letero, ke mia edzo salutas. Kaj poste mi eksciis, ke li estas mortigita.

Ŝi ekstaris kaj enlasis homojn, kiuj venis ripari la defluilon en la kuirejo.

– Mi estas tridekkvinjara, nur mi tiel aspektas. Mi ne havas dentojn, mi ne havas okulon...

Ŝi edziniĝis estante dudektrijara. Ili loĝis en Varsovio ĉe strato Stawki. Ŝi laboris en fabriko, faris per maŝino lanajn gantojn, li estis ŝuisto. Unue li ankaŭ laboris en fabriko, poste li faris ŝuojn hejme. Jes, estis sufiĉe malfacile al ili. Infanojn ili ne havis.

– La edzo nomiĝis Rajszer, sed mi nomiĝas Zielona. Ĉar mi ne havis dokumentojn kaj oni enskribis al mi la nomon de la patro.

Post momento de medito ŝi aldonis ankoraŭ:

– Kaj mia antaŭnomo estas Dvojra.

En la jaro 39 bomboj detruis la domon ĉe Stawki. Ili perdis ĉion – aĵojn, vestojn. Kaj ili translokiĝis al Janów Podlaski.

Ŝi ĝemetis.

– Tie ni jam portis du flavajn triangulojn, ses tiajn pintojn, la palestinan signon. Kaj nur poste ni portis brakrubandojn. Ni ambaŭ.

En oktobro de la jaro 42 la edzo ne plu estis, car li laboris en tiu lager Małaszewicze. Tiam ili translokiĝis la tutan loĝantaron de Janów Podlaski al Międzyrzec. Ĝi estis tia Judenstadt, tie estis ĉiuj judoj de la Lublina vojevodio. Ĉiujn du semajnojn oni transportis homojn al Treblinka per vagonaro. Tiuj, kiuj restis, estis fermitaj en geto. Aliaj pereis, ŝi ne.

– Kiam estis "agado", tiam mi ĉiam kaŝiĝis. Mi sidis en subtegmentejo.

Per disetenditaj fingroj de ambaŭ manoj ŝi kovris sian vizaĝon. Kaj momenton ŝi rigardis per unu okulo tra fendoj inter la fingroj.

– Ĉu tio signifas, ke vi kovradis vian vizaĝon per la manoj?

Ŝi ekridetis. – Ho, ne! Mi nur montras al vi, ke tiel mi ĉiam kaŝis min.

Ŝi sidis en la subtegmentejo kaj pensis: "Nun mi vivas, sed post horo mi ne scias, kio estos". Sed aliaj pereis, kaj ŝi ne.

– Foje mi tiel kaŝiĝis, kiam estis "agado", dum plenaj kvar semajnoj. Sen manĝo.

Ankaŭ tion, kiel tiujn disetenditajn fingrojn sur la vizaĝo, oni devis kompreni en certa senco metafore.

– Nu, mi prenis kelkajn cepojn kaj mi havis tie grion, do mi manĝis tion. Ne, ne kuiritan. Kiel do! Ne estis ja akvo. Mi havis ankaŭ iom da muelita grenkafo, do mi ankaŭ manĝis tiun krudan kafon. Nenio doloris al mi. Mi pensis: mi mortos. Mi estis tiel malfortiĝinta. Mi estis unusola en la mondo.

Foje mi ekaŭdis, ke en la strato estis ia movado. Ĝi estis en decembro de la jaro 42.

Mi aŭdis la movadon, do mi sciis, ke oni ne plu gardas la postenon. Do mi maisupreniris. Post la "agado" oni povis ree iradi meze inter la pikildratoj. Jes, estis ankoraŭ la juda komunumo. Ĝi donadis iom da pano.

Sed ne estis grava tiu tuta nia vivo... Mi havis kelkajn ĉemizojn, do mi vendis ilin kaj aĉetis al mi panon por morgaŭ, por postmorgaŭ.

La okulon mi perdis la unuan de januaro en la jaro 43. Estis tia amuzaĵo ĉe la germanoj. Ili amuziĝis en Silvestrovespero. Ili mortpafis sesdek kvin homojn. El mia domo nur mi sola restis, do mi ankoraŭ vivas. Ili pafadis sur la strato, sur la neĝo, je la sesa matene. Ili eniradis en loĝejojn. Do mi volis forkuri, mi elsaltis tra fenestro. Mi pensis, ke mi mortigis min. Kaj mi ricevis pafon en la okulo.

Kiam ili pafis al mi, tiam mi sentis tiel: "tamen eble ankoraŭ mi vivas..."

Ŝi malaltigis la voĉon, diris konfidence:

– Mi diros al vi, sinjorino: mi volis vivi. Mi ne scias, car mi havas nek edzon, nek familion, nenion, kaj mi volis vivi. Okulon mi ne havis, mi estis malsata kaj malbone vestita – kaj mi volis vivi. Kial? Nu, mi diros al vi: tial, por diri ĉion tiel, kiel mi nun al vi diras. Sciu la mondo, kion ili faris.

Mi pensis, ke mi vivos unusola. Mi pensis, ke en la mondo ne restos eĉ unu judo.

Oni prenis min en malsanulejon. En la okulo mi nenion sentis, sed pli multe doloris al mi ĉi tie: la sakro kaj la kruroj. Pro la kontuzo. Tial mi diris: "Donu al mi tranĉilon". Ĉar mi volis fari finon kun mi. Mi ne povis vivi plu. Mi ne havis okulon, mi havis nenion. La okulo elfluis tuta. Sur la orelo mi ankaŭ havis vundon. Oni volis min rentgenumi. Sed ĝi mem resaniĝis.

Kiam oni forprenis la reston de ni, tiam mi ne plu kaŝis min. Kaj mi mem sekvis la niajn al tiu Majdanek.

Mi ne havas groŝon, mi ne havas manĝon, mi ne havas okulon. Judoj ne plu estas – do kion mi devas fari sola sur tiu subtegmentejo? Panpecon mi ankaŭ ne plu havis. Se mi estu mortanta, mi preferis morti kune kun ili, ne sola.

Nu, tial mi iris al Majdanek. Tie ili donis tre malmulte da pano. Kaj iom da supo je la dekdua.

Ĉu ni reciproke helpis nin? Ĉu mi scias. Ni helpis iom. Sed ne multe. Ho, vi scias, sinjorino, ĉiu havas sian ĉagrenon: kion li povas fari? Ĉiujn du semajnojn estis selekto, tia kribrado. Kion oni povas fari?

Ĉu ili batis min? Jes: foje en Majdanek SS-virino Brigitte – tiu batis min. Per kio? Ŝi havis bastonon. Mi ricevis de ŝi sur la kapon. Kaj pro kio? Ŝi ridas kun kompatato. – Ĉar ŝi tiel volis, nenion plu. Tiam ĉiuj ricevis. Ĉar unu estraĉino, tia fakestrino, diris pri unu el ni, ke ŝi faras negocojn. Ke ŝi ion aĉetas. Kaj pro tiu unu ĉiuj ricevis. Sed ĉu ŝi faris negocojn? Mi ne scias.

Forkuri ne estis eble. Unu fraŭlino forkuris. Tiam ili kaptis sin kaj pendigis. Tie staris tia fosto kaj hoko ... Ni estis ĉirkaŭ dek mil sur la placo kaj ni devis ĉiuj rigardi tion.

Ŝi estis trankvila, tre trankvila – la SS-viro demandis, kion ŝi volas antaŭ la morto. Kaj ŝi respondis: "Nenion, nenion, faru pli rapide, kion vi volas". Ŝi estis dudekjara, ŝi estis delikata.

Estis ankaŭ du fratoj. Poste ili mem pendigis sin.

Ŝi leviĝis por ellasi la laboristojn, kiuj finis jam sian laboron. Sed ŝi tuj revenis kaj sidiĝis sur sia loko.

– Foje venis SS-viro el Skarżysko-Kamienna, ĉefo Imfling. Li diris: "Kiu volas labori, tiu veturos al laboro". Mi sciis, tial mi veturis. Tio estis municia fabriko.

Tie mi ne ricevis batojn eĉ unu fojon. Sed ankaŭ tie ofte estis la selekto, se iu jam estis en malsanulejo, ili mortigis lin. Kiu havis liberigon de laboro, eĉ se nur kelkajn tagojn li ĉesis labori – tuj ili mortigis lin.

Mi havis nur unu okulon kaj sur tiu ĉi okulo fariĝis al mi tia hordeolo kiel absceso. Nu do mi estis blinda. Sed mi laboris, neniun tagon mi forlasis, dekdu horojn potage. Unu semajnon dumtage, unu semajnon dumnokte. Kaj vidu, mi ne petis forpermeson, mi ne iris al kuracisto. Mi timis. Ĉar tio estis la morto. Mi pensis, ke eble mi travivos tion, kaj eble . . .

Ŝi ekridetis nekuraĝe kaj honteme.

– Evidente ree mi volis vivi. Ankoraŭ ion ŝi ekmemoris.

Nun mi diros al vi, kiel estis kun la dentoj.

Kiam mi venis al Skarżysko-Kamienna, tie ili donis nur iom da supo. Do mi estis terure malsata. Oni povis aĉeti manĝaĵon de laboristoj, kiuj venadis el la urbo por labori. De tempo al tempo ili mem ion donis, sed prefere oni devis aĉeti. Kaj mi ne havis monon. Tial mi mem eltiris al mi la orajn dentojn.

Ĉu mi eltiris helpe de ŝnuro? Ne. Nur dum kelkaj tagoj mi movis, movis. Kiam ĝi bone moviĝis, tiam jam estis facile elŝiri ĝin. Ĝi mem eliris. Por unu dento mi ricevis okdek aŭ okdek kvin zlotojn. Kaj mi aĉetis al mi sufiĉe da pano.

Dektri monatojn mi tiel laboris. En Skarżysko-Kamienna la rusoj proksimiĝis al Skarżysko, tiam la germanoj transportis la tutan fabrikon kune kun ni al Częstochowa. Kaj tie estis ree la sama laboro.

La deksepan de januaro venis la sovetianoj. La SS-viroj forkuris la deksepan. En Częstochowa estis dekkvin mil judoj. Restis kvinmil, la reston ili veturigis al Germanujo, per vagonaroj. Nenion oni povis fari kontraŭ tio. Estis tiaj registroj. La majstro enskribis kaj ili prenis la homojn laŭ la registro.

La majstroj gardis nin. Se la sovetianoj venus ankoraŭ kelkajn horojn pli poste, ni estus mortigitaj.

Ni estis jam vicordigitaj en la strato. Sed la sovetianoj venis kaj la majstroj forkuris.

Ĉu ni ekĝojis, kiam ili venis? Jes, ni tre ĝojis. Ĉar ni ne plu estis malantaŭ la pikildrataro, ĉar ni estis liberaj. Ni bonvensalutis ilin, sed ni nek kriis, nek ion ajn ...

Ŝi ĝemetis.

– Ni ne plu havis forton . . .

LA "VIZO"

– Mi ne havas malinklinon al judoj. Tiel same kiel mi ne havas malinklinon al formiko aŭ al museto.

Ŝi atendas momenton, kion mi diros al tio.

Ŝi sidas peze. Ŝi estas granda kaj sufiĉe dika. Ŝi ĝis nun ne disiĝis de sia koncentreja kitelo kun grizaj kaj malhelbluaj strioj. Ankaŭ ĝis nun ŝi havas mallonge tonditajn harojn sur la kapo kiel viroj. Kaj sur ĝi tian saman ĉapeton kun grizaj kaj malhelbluaj strioj.

Ŝi venis por vizito. Ŝi sidas sur mola apogseĝo en hotela ĉambro. Ŝi petas pri nenio, ŝi bezonas nenion, precipe ŝi ne bezonas monon. Kaj tiun, kiun ŝi ricevis de la Helpservo, ŝi deziras fordoni piej rapide al iu ajn, al kiu ĝi estas pli bezonata. En ekstrema okazo ŝi volas ĝin fordoni almenaŭ por depono. Ĉar ĝi tiel naŭzas ŝin.

Per la mano ŝi tenas du grandajn, lignajn lambastonojn, apogitajn al la seĝapogilo.

– Kial mi parolis pri tiu museto – ŝi respondas, kvankam mi ne demandis sin pri tio. Kaj ŝi ridetas.

Ŝi ridetas belete. Ŝi montras ĉe tio multajn blankajn, junajn dentojn. Siaj brunaj okuloj lumas forte, la vangoj estas malhelaj kaj rozkoloraj.

Ŝi estas juna, sed tre malbeligita per tiu tro mallonga hararo, hirtiĝanta kiel broso, per tiu ĉapo de helpkuiristo kaj per tiuj grandaj okulvitroj sur la nazo.

Ĉar foje kun unu mariavitino ni senŝeligis terpomojn en la kuirejo de nia tendarfako. Kaj en tiuj terpomoj ni trovis neston de musoj. La nesto estis en terpomo. La tuta internaĵo estis formanĝita, kaj ili sidis en la ŝelo. Ili estis tri junaj musetoj, tute kvazaŭ nudaj. Tiel malpurerozkoloraj. Tiu mariavitino volis ilin doni al la kato. Sed mi ne permesis ...

Ŝi hezitas mallongan momenton

– Ĉar ekestis en mi tia penso: sed kiel ĝi, tiu kato, manĝos tiujn musojn?

Kaj ŝi aldonis nevolonte:

Estis en mi tia scivolemo kiel en gestapano – kiel tio aspektos? ...

Ŝi meditis pli longe pri tiu speciala aperaĵo. Ŝi rigardis kvazaŭ en sin mem kaj ekĝemetis.

Do mi rekaŝis ilin en tiun ŝelon kaj enŝovis ĝin profunde en la paj lon. Eble la patrino trovos

ilin kaj iel ili saviĝos.

Tiel do vere ŝi ne havas malinklinon al judoj, malgraŭ ke ŝi mem estas kristanino. Ŝi katolikiĝis ankoraŭ komence de la milito, kiam ŝi tre suferis rigardante tiom da maljustaĵoj kaj kruelaĵoj. La penso pri la turmentoj de Sinjoro Jesuo helpis al ŝi elteni tion pli facile.

Ŝi havas polan nomon kaj polajn dokumentojn, en la koncentrejo ŝi estis kiel polino, ne kiel judino. Ŝi ne scias bone, kiuj estis ŝiaj gepatroj, ŝi vidis ilin neniam. Ŝi konas nur sian avinon, kiu edukis sin. Sed tio ne estas grava. Cetere la avino ankaŭ ne vivas plu.

Tiu ĉi cirkonstanco postulas ankaŭ momenton da pripenso.

– Ĝenerale mi malestimas neniun. Sed tio ne estas grava.

Tamen grava estas la sekvanta afero:

– Ĉu vi scias, sinjorino, kion signifas: iri al "vizo"?

– Mi ne scias.

En la koncentrejo de la mateno SS-virinoj vokadis: – Iru al la vizo! Iru al la vizo! Kaj la jugoslavinoj diris: Iti na luku . . .

Tio estis en oktobro. La tagoj estis tre malvarmaj, malsekaj. Ĉiuj virinoj de unu barako iris al la vizo. Kaj ili restis tie ĝis la vespero. Ĉar la barako devis esti pura.

Kaj la vizo estas herbejo tuj apud la arbaro, sub la arboj. Tie ili staris en malvarmo dum la tuta tago sen mango kaj sen laboro. La barako devis esti pura, la ordigado kaj purigado daŭris kelkajn tagojn. Kaj ili tie staris. Mi ne scias, kiom da ili povis esti tie. Granda amaso. La germanoj kredeble tial malamis ilin tiel, car ili estis tiel multaj . . . francinoj, nederlandanoj, belginoj, multe da grekinoj. Tiuj grekinoj estis en la piej malbona stato. La polinoj kaj rusinoj estis pli fortaj.

Ili staris ĉiuj dense, unu apud alia, kvankam estis sufiĉe da loko. Malpuraj, kovritaj per abscesoj kaj ulceroj. Inter ili estis malsanaj kaj eĉ mortantaj. Tiujn oni ne kuracis plu ...

Ŝi daŭre parolas pri ili, ne pri si. Do ne estas klare, ĉu ŝi estis tie kun ili, aŭ ĉu ŝi rigardis de ekstere.

– Ĉar ili estis en la koncentrejo jam sep monatojn, kaj ni jus venis kun nova transporto. Sed tuj la sekvantan tagon ankaŭ ni estis sur la vizo. Ili aspektis terure kaj ĝuste estis piej malbone, ke ili estis tiel multaj. Mi sciis, ke kun ni estos same.

Ŝi ne parolas pri tio, kion ŝi suferis mem. Ŝi parolas ĉiam nur pri aliaj.

– Mi ne timis. Mi sciis, ke mi mortos, do mi ne timis.

Pri si ŝi povas diri tion, ke ŝi ĉiam preĝis, kiam oni batis ŝin. Ŝi preĝis, por ke ŝi ne sentu malamon. Nenion plu.

Ankaŭ ŝi havas ne multe por diri pri sia kripleco. La kruro kunkreskis malbone, do oni devas fari operacion ankoraŭfoje, rompi la oston kaj denove kunigi ĝin. Jes, memkompreneble ŝi iros en malsanulejon, sed ne tuj. Antaŭe ŝi devas prizorgi kelkajn aferojn. Ekzemple ŝi volus ankoraŭ veturi al Gdańsk kaj vidi la maron. Kaj ankaŭ viziti unu koleginon el la koncentrejo, kiu nun estas en Poznań. Jus ŝi ricevis leteron de ŝi kaj scias, ke ŝi povos komplezi sin iel.

En kiaj cirkonstancoj ŝi rompis la kruron kaj ĉu tiam ŝi ankaŭ ne sentis malamon, oni ne scias. Ĉiuokaze en la malsanulejon ŝi iros nur poste.

– Sur la vizon ili peladis ilin dum tuta semajno ĉiutage. La virinoj staris tie ĉiam tre kunpremitaj, por varmigi sin. Ĉiuj klopodis esti en la mezo, pro varmo, neniu volis resti ekstere. Ili klinadis la kapon kaj enpremadis sin inter aliajn, kiel ili povis. Ĉio kune moviĝadis konstante . . .

Kelkaj estis tute en vundoj, kaj tamen unuj alpremadis sin al aliaj. Kaj ĉiam pli multe da ili mortis.

Tutan semajnon ili tiel forpeladis ilin. Ĝis la selekto.

– Unu tago estis ankaŭ malvarma, sed tagmeze montriĝis la suno. Tiam ili ĉiuj traŝoviĝis en tiu direkto, kie la arboj ne kaŝis la sunon. Ili ŝoviĝis ne kiel homoj, sed kvazaŭ iaj bestetoj. Aŭ kvazaŭ ia amaso . . .

Guste tiun tagon la grekinoj kantis la nacian himnon. Sed ne greke. Ili kantis hebree la judan himnon... Ili kantis en tiu suno tre bele laŭte kaj forte, kvazaŭ ili estus sanaj.

– Tio ne estis fizika forto, sinjorino, ĉar ĝuste ili estis ja la piej malfortaj. Tio estis la forto de sopiro kaj dezirego.

La sekvintan tagon estis selekto. Mi venis al la vizo kaj la vizo estis malplena.

LA HOMO ESTAS FORTA

La palaco, kiu ne plu estas, staris sur la rando de altaĵo, super vasta vidaĵo al printempa lando, glata ĝis la horizonto, egale dividita de verdaj kampoj.

La palaco diskrevis, kiel diras Minaelo P. Ĝi estis eksplodigata en la sama tempo, kiam en la proksima fama Ŝuchowski-arbaro forbrulis kvar kremaciejoj.

Ĝi estis uzata kiel dekoracio, kiel grandioza, arkitektura pordego kondukanta de la vivo al la morto. Ĝi ludis la rolon de metaforo en tiu ceremonio, kiu okazadis ĉi tie dum longa tempo kun neŝanĝebla ĉiutaga kutimo. Homoj lacaj de la vojo, ankoraŭ vivaj, ankoraŭ estantaj ili mem, en propraj vojaĝaj vestoj, transpasadis la unuan kaj duan pordegon kaj enveturadis la internan korton de la rezidejo. Oni malfermis la malantaŭan pordon de ŝarĝaŭtomobilo, la veturantoj helpante al si reciproke surpaŝis grandare la ŝtuparon, povante ankoraŭ pensi, ke – laŭ la surskribo super la enirejo – ili eniras en banestablejon. Post kelka tempo, trairante trans la internon de la domo, ili aperis sur la teraso en ĝia kontraŭa flanko jam nur en subvestoj – kelkaj ankoraŭ kun peco da sapo kaj viŝtuko en la mano. Instigataj al rapido, evitante batojn per kolboj, ili enkuradis senorde per tabulponteto en la faŭkon de gasaŭtomobilo starigita kun ĝia malantaŭa parto kontraŭ la palaco kaj granda kiel meblovagano.

Hermeta pordo ĵetfermiĝis kun bruoj. Nur nun homoj kun alia destino, sidantaj en la palacaj keloj, povis ekaŭdi grandan krion de timego. Fermitaj en la kaptilo ili vokis helpon, pugnofrapis al la vandoj de la veturilo. Post kelkaj minutoj, kiam la krioj silentiĝis, la maŝino forveturis. Je ĝusta tempo ĝian lokon reprenis alia.

La palaco ne plu estas. Kaj ne estas tiuj homoj. Sur la rando de la altaĵo restis piata kvarangulo de diferenca plantaro, elrampanta per tigoj kaj folioj el inter eta gruzo, limigita per ĉeteraj restaĵoj de muroj. Kaj restis malsupre sub la abruptaĵo granda spaco de la vidata mondo – malproksimaj, verdaj kampoj, majaj arboj super herbejoj, surirantaj sur sin bluaj strioj de arbaroj en la hordzonto.

En la sunbrilo kolektiĝis sur la loko de iamaj ĝardenoj grupeto da homoj. Ĉiu povas diri, kio okazis ĉi tie. Cirkaŭ la palaco oni starigis lignan tabulbarilon. Altan je tri metroj. Ne multon oni povis vidi. Sed oni povis aŭdi, kiel oni altiradis ion, kiel grincis ĉenoj. Dum terura frosto oni elpeladis judojn en ĉemizoj. Antaŭ la palaco ĉiam bruis grandaj maŝinoj kaj direktiĝis al Ŝuchowskiarbaro. Homaj krioj ankaŭ estis aŭdeblaj.

– Mi loĝis en Ugaj, mi laboris ĉe germanoj.

Tiel diris Miĥaelo P., juna, granda judo kun atleta staturo kaj malgranda kapo. Li parolas nelaŭte, trankvile, sed tamen solene, kvazaŭ li recitus sanktan tekston.

– Mi forkondukis al la aŭtomobilo mian patron kaj mian patrinon. Poste mi kondukis mian

fratinon kaj ŝiajn kvin infanojn kaj mian fraton kun lia edzino kaj tri infanoj. Mi volis libervole veturi kun la gepatroj, sed oni ne permesis al mi.

Hi havis kaŭzojn por tio.

– Mi laboris tiam ĉe malkonstruado de malnova garbejo komisiite de la Juda Komitato en Ugaj, do mi ne estis en la listo, kiam ili fortransportis judojn el Koło.

Kelkaj timis. Tiam Siuda, militista ĝendarmo devenanta de polaj "folksdojĉoj", diris al ili: "Ne timu, ili veturigos vin al la stacidomo Barłogi, kaj de tie vi veturos pluen al laboro". Do ili ne timis. Kelkaj eĉ mem volis veturi.

Ili forveturigadis la judojn el Koło dum kvin tagoj. En la fino ili forveturigis malsanajn judojn, sed al la ŝoforoj ili ordonis veturi kun ili malrapide kaj singarde.

Komence de januaro 1942 ili prenis min en Ugaj kune kun kvardek judoj al ĝendarma posteno. La sekvintan tagon alvenis ŝargaaŭtomobilo el Izbica kaj en tiu ĉi aŭtomobilo estis dekkvin judoj el Izbica. La germanoj pelis nin al ili kaj veturigis al Chełmno. Ĉiuj en tiu ĉi aŭtomobile estis homoj fortaj, kapablaj al piej peza laboro.

Per impona mangesto li montris la lokon, kie tra folioj estis videblaj la ruinoj.

– Tie la palaco ankoraŭ staris. Mi estis scivola, kiel ĝi aspektas. Sed ili ne permesis al ni rigardi. Kiam la aŭtomobilo enveturis en la duan korton, mi forŝovis la tukegon kaj rimarkis, ke sur la tero kuŝas uzitaj homaj ĉifonoj. Do mi jam sciis, kio fariĝas.

De la aŭtomobilo oni pelis nin al la kelo. Ili kurigis nin per kolboj. Sur la muro estis skribite judlingve: "Kiu venas ĉi tien, ĉiu havas la morton".

La sekvintan tagon ili vokis min supren, por elporti vestojn kun aliaj. En granda ĉambro estis ĵetitaj sur la plankon diversaj vestaĉoj de viroj kaj virinoj, paltoj kaj ŝuoj. Tion oni devis transporti en alian ĉambron. Kaj tie jam kuŝis tiom. . . Botojn ni staplis sur apartan lokon. En tiu unua ĉambro, kie la judoj senvestigis sin, staris du fornoj bone hejtitaj. Estis varme, por ke ili volu facile senvestigi sin.

En la kelo ni havis fenestrojn najlitajn per tabuloj. Sed se unu el ni levis la alian, oni povis tra fendo ion vidi.

La germanoj elpelis la homojn tra la teraso nur en subvestoj. Do ili ne volis eliri en la froston sen vestoj. Ili jam rimarkis, kio estas, ili komencis reiri. Tiam la germanoj batis ilin kaj enpelis en la aŭtomobilom

Tiuj, kiuj post laboro venis en la kelon por tranokto, diris, ke en la arbaro oni enterigas sufokitajn homojn. Tiam mi anoncis min al la laboro en la arbaro. Mi pensis, ke el la arbaro

oni povas forkuri.

Ili prenis tridekon da ni en la aŭtomobilon, veturigis en la Żuchowski-arbaron, donis fosilojn kaj pioĉojn. Je la oka matene alvenis la unua aŭtomobilo de Chełmno. Kiu laboris en la foso, ne havis la permeson turni sin al la aŭtomobilo. Sed mi vidis. La germanoj – kiam ili malfermis la pordon – forsaltis de la aŭtomobilo. El la interno venis malhela fumo. En la loko, kie ni staris, estis flarebla nenia odoro. Poste tri judoj eniris en la aŭtomobilon kaj ili elĵetadis la kadavrojn teren. En la aŭtomobilo ili kuŝis unuj sur aliaj preskaŭ ĝis duono de la alto. Kelkaj reciproke ĉirkaŭprenis sin per brakoj. Al tiuj, kiuj ankoraŭ vivis, la germanoj pafis en la malantaŭon de la kapo. Post la elĵeto de la kadavroj la aŭtomobilo forveturis al Chełmno.

Poste du judoj transdonis la kadavrojn al du ukrainanoj. Ili estis en civilaj vestoj. Ili eltiradis per tenajloj orajn dentojn de la kadavroj, forprenis de iliaj koloj saketojn kun mono, de la brakoj horloĝojn. de la fingroj edziĝringojn.

Ili pedante traserĉadis la kadavrojn, estis abomeninde.

Ĝis tiu tempo ili faris tion triope. Sed ĝuste tiun tagon ili enpuŝis dum la ŝargado unu ukrainanon kune kun la judoj en la gasaŭtomobilon. Li kriis, sed la aliaj ankaŭ kriis tiel, ke la germanoj ne orientiĝis. Kaj tiel li sufokiĝis kun tiuj judoj, kiujn li estis revizionta.

Kiam la aŭtomobilo venis en la arbaron, tiam ili rekonis tiun ukrainanon kaj nepre volis lin savi. Ili aplikis artefaritan spiradon, sed nenio plu helpis.

La germanoj mem ne reviziis la kadavrojn, sed ĉiam atente rigardis al la manoj de la ukrainanoj dum tiu laboro. Kaj kion tiuj trovis, la germanoj metis en apartan valizon.

La subvestojn ili ne ordonis forpreni de la kadavroj.

Post la traserĉo de la kadavroj ni metis ilin en la foson, alterne, unu kun la kapo ĉe la piedoj de la alia, tre dense, por ke multaj lokiĝu. Ĉiuj turnitaj kun la vizaĝo al la tero. Ju pli alte des pli larga estis la foso, ĉe la supro lokiĝis tiel ĉirkaŭ tridek kadavroj. En tri, kvar metroj da foso lokiĝis milo.

Dum la tago alveturadis en la arbaron transporto de sufokitoj dektrifoje, unu aŭtomobilo enhavis por unu fojo ĝis naŭdek. La judoj purigadis la plankon de la aŭtomobilo, kiam ili trovis ion oran, ili same fordonis ĝin en la valizon. La sapoj kaj la viŝiloj estis resendataj al Chełmno.

De la komenco mi interkonsiliĝis kun la aliaj, por forkuri. Sed la homoj estis tro deprimitaj. Nia laboro daŭris tutan tagon ĝis krepuskiĝo. Dum la laboro oni batis nin, por ke ĝi iru pli rapide. Se iu laboris tro malrapide, tiam ili ordonis kuŝiĝi kun la vizaĝo sur la kadavroj kaj per revolvero pafis al li en la malantaŭon de la kapo.

La ĝendarmoj, kiuj nin gardis dum la deĵoro, estis sobraj. Ili ĉiam estis la samaj. Ili ne interparolis kun ni. Kelkfoje iu ĵetis al ni en la foston paketon da cigaredoj.

Foje tri fremdaj germanoj alveturis en la Żuchowski-arbaron. Ili interparolis kun SS-oficiroj, rigardis kune la kadavrojn, ridis kaj forveturis.

Dek tagojn mi laboris. La arbaro tiam ankoraŭ ne estis ĉirkaŭbarita. fornoj por bruligado de la kadavroj ankoraŭ ne estis. Ce mi oni sufokis judojn el Ugaj, judojn el Izbica, vendrede ili alveturigis ciganojn el Lodzo, sabate judojn el la geto en Lodzo. Kiam la judoj el Lodzo alvenis, la germanoj faris inter ni selekton, fordonis dudekon da pli malfortaj al gaso kaj prenis sur tiun lokon novajn judojn el Lodzo.

La unuan tagon tiuj judoj el Lodzo estis fermitaj en la alia kelo kaj demandis tra la muro, ĉu la tendaro estas bona, ĉu oni donas multe da pano. Kiam ili eksciis, kio okazas ĉi tie, ili terurigiĝis kaj diris: "Kaj ni mem anoncis nin al la laboro. . ."

Li eksilentis por momento, konsideris ion en si. Lia granda, osteca korpo fleksiĝis pro interna laciĝo. Post pripenso li diris tiel:

– Unu tagon – ĝi estis mardo – el la tria aŭtomobilo, kiu venis tiutage de Chełmno, ili elĵetis sur la teron la kadavrojn de mia edzino kaj de miaj infanoj, la knabo estis sep, la knabino kvarjara. Tiam mi kuŝiĝis sur la kadavro de mia edzino kaj diris, ke ili mortpafu min.

Ili ne volis pafi min. Unu germano diris: "La homo estas forta, li povas ankoraŭ bone labori". Kaj li batis min per stango, ĝis mi leviĝis.

Tiun vesperon du judoj pendigis sin en la kelo. Mi ankaŭ volis pendigi min, sed malaprobis min iu pia homo.

Tiam mi interkonsentis kun unu, ke ni kune forkuru dum la vojo. Sed ĝuste tiun fojon li veturis per la aha aŭtomobilo. Do jam mi diris al mi, ke mi forkuros sola.

Kiam ni enveturis la arbaron, mi petis la eskortanton pri cigaredo. Li donis. Mi repaŝis, kaj la aliaj same ĉirkaŭis lin petante pri cigaredoj. Mi tranĉis per tranĉilo la tolan surkovraĵon ĉe la ŝoforo kaj elsaltis el la aŭtomobilo. Ili pafis post mi, sed ili ne trafis. En la arbaro biciklanta ukrainano pafis al mi, li ankaŭ ne trafis. Mi forkuris.

En la vilaĝo mi kaŝiĝis en garbejon kaj enfosiĝis profunde en fojnon. Matene mi ekaŭdis, kiel ĉe la muro vilaĝanoj parolis, ke la germanoj estas en la vilaĝo kaj serĉas judon, kiu forkuris. Post du tagoj, nenion manĝinte, mi kaŝiris el la garbejo. Dumvoje mi eniris al vilaĝano – mi ne konas lian nomon. Li satigis min, donis al mi ĉapon, razis, por ke mi aspektu kiel homo. De li mi iris al Grabowo kaj tie mi renkontis tiun judon, kun kiu mi estis interkonsentinta pri la

forkuro. Li forkuris la saman tagon de la alia aŭtomobilo.

Antaŭ la forveturo ni estis en la Żuchowski-arbaro, kie iam laboris Miĥaelo P. ĉe la fosado de la grandegaj, kolektivaj tomboj, kaj kie li rekonis la kadavrojn de siaj sufokitaj edzino kaj infanoj.

Sur vasta enarbara herbejo, ĉirkaŭitaj per malaltaj, malhelaj, dense kreskantaj pinoj kuŝis strioj de malpli forte kreskanta malalta herbeto. Sur ili ne estis verdaj branĉoj de erikoj, vakcinioj aŭ filikoj. En unu loko la kavo estis disfosita kaj en la facile ŝutebla, malpura sablo estis videbla peco da homa piedo. Pli malproksime, kie la arbaro estis pli alta, oni montradis lokon de bruligitaj kremaciejoj.

Du virinoj el tiu ĉirkaŭaĵo sekvis nin tra la arbaro. Interkonatiĝante kun ni ili demandis, ĉu la Komisiono povus plirapidigi la elterigon. Tio estis patrino kaj edzino de homo, kiu tute en la komenco de la ekzistado de la koncentrejo ĉi tie estis mortpafita. Ili konis la lokon, kie tiu 5i tombo estis.

Iu estis montranta trovitan peceton da alumeta skatolo kun greka surskribo, alia paperetojn ellavitajn per pluvoj, kun alilandaj apotekaj firmoj. Iu, sur la loko de la iama kremaciejo, trovis du etajn homajn ostetojn.

PLENKRESKULOJ KAJ INFANOJ EN OŚWIĘCIM

Se ni ĉirkaŭprenas per niaj pensoj la gigantecon de plirapidigita morto, kies loko – sendepende de militaj agadoj – fariĝis la teritorioj de Polujo, tiam, krom terurego, la piej forta sento, kiun ni spertas, estas la miro.

Oni sufokis kaj bruligis tiujn sennombrajn homajn amasojn en procedo de piej zorgeme pripensita, raciigita, rutina kaj perfektigita organizo. Oni ne rezignis ĉe tio pri manieroj pli arbitraj, amatoraj, respondantaj al individuaj preferoj.

Ne dekoj da miloj kaj ne centoj da miloj, sed milionoj da homaj estaĵoj estis transformataj al krudmaterialo kaj komercaĵo en la polaj mortigejoj. Krom vaste konataj lokoj, kiel Majdanek, Oświęcim, Brzezinka, Treblinka, ĉiam denove ni malkovras novajn, malpli famajn.

Kaŝite inter arbaroj kaj verdaj montetoj, kelkfoje malproksime de relvojoj, ili permesis disvolvi sistemojn ankoraŭ pli simpligitajn kaj ekonomiajn.

Tiel oni trovis tutajn kusejojn de kadavroj, enterigitaj en Tuszynek kaj Wiączyn apud Lodzo.

Tiel sufiĉis unu malnova palaco en Chełmno, situata sur monteto, kun belega vidaĵo al pejzaĝo ondanta per herboj kaj grenoj, unu grenmagazeno duone ruinigita, unu parcelo de juna, pina arbaro kuŝanta en la proksimo, vasta, dense ĉirkaŭita per tabulbarilo, por atingi nombron de preskaŭ unu miliono da viktimoj.

Sufiĉis unu malgranda, ruĝa konstruaĵo el brikoj apud la Anatomia Instituto en Wrzeszcz apud Gdańsk, por el murditaj homoj fandi grason por sapo, kaj tani ilian haŭton je pergameno.

Al judoj arestitaj en Italujo, Nederlando, Norvegujo kaj Cefioslovakujo la germanoj promesadis bonegajn laborkondiĉojn en la tendaroj en Polujo, al scienculoj oni certigadis postenojn en institutoj de sciencaj esploroj. Al iu grupo da judoj oni donacis kiel proprajon la riĉan, polan industriar urbon Lodzo. Ĉe tio oni rekomendis al ili, ke ili prenu kun si nur la piej valorajn objektojn.

Kiam transporto de arestitoj estis veninta al la destinloko, la homoj estis elvagoniĝantaj sur unu flanko de la relvojo, kaj la valizojn oni estis ĵetanta en grandaj amasoj sur la alia flanko.

Krome en loĝbarakoj oni al ili ĉiuj ordonis senvestiĝi antaŭ eniro al banejo kaj kunmeti zorgeme la vestojn. Kiam ili eliris de tie, neniu el ili trovis sian veston. Unujn oni enpelis preskaŭ nudajn en gaskameron aŭ al hermetaj aŭtomobiloj, en kiuj dum veturado al la kremaciejo ili sufokiĝis de la motorgaso. Aliaj ricevis anstataŭe ĉifonojn, en kiuj ili estis kondukataj al laboro.

Kiel en aliaj koncentrejoj ankaŭ en Oświęcim amasiĝadis tutaj magazenoj de lanvestaĵoj,

piedvestoj, valoraĵoj, objektoj de persona uzo. Vagonaroj ŝarĝitaj per komercaĵoj forveturadis Germanujon. Brilantojn de malmuntitaj ringoj oni elsendadis en korkitaj boteloj. En plenaj vagonoj oni ekspedadis tutaj n kestojn da okulvitroj, horloĝoj, pudruj oĵ, dentbrosoj – ĉio havis sian valoron.

Utiligado de la bruligitaj ostoj kiel sterko, de la graso por sapo, de la haŭto por ledaĵoj, de la haroj por matracoj – tio estis jam nur kromprodukto de tiu grandega ŝtata entrepreno, alportanta dum jaroj nekalkuleblajn enspezojn.

Tiu konstanta dividendo fluis de homa turmento kaj de homa terurego, kaj ankaŭ de homa malnobligo kaj krimo, kaj ĝi formis esencan ekonomian racion de la tuta aranĝo de la tendaroj. Ideologia postulato de la neniigo de rasoj kaj nacioj servis al tiu celo, formis ĝian pravigon.

De malliberuloj, revenantaj nun Polujon de la germanaj koncentrejoj de Dachau kaj Oranienburg, ni ekscias novajn detalojn, kiuj kompletigas nian scion pri la fakta aferstato. Montriĝas, ke en Germanujo tutaj taĉmentoj da specialistoj okupiĝadis pri malkudrado de vestoj kaj piedvestoj venigataj de la polujaj koncentrejoj al la centrejo. En kunkudroj de la vestoj, en plandumoj kaj sub kalkanumoj de ŝuoj ili trovadis multe da enkudritaj oraj moneroj. Post la morto de Himmler ne vane oni malkovris kaŝitajn en lia restadejo apud

Berchtesgaden centmilojn da pundoj en devizoj de dudek ses ŝtatoj.

Ĉe konatiĝo kun la nekutima fenomeno de Oświęcim – tiel sur bazo de la materialo, kiun donis la konstatoj de atestantoj, kiel per propraokulaj observoj de la dramloko – surprizis la fakto de tre celkonforma aplikado de sistemo kaj aranĝoj de tiu koncentrejo al tasko havanta duoblan karakteron: politikan kaj ekonomian, oni povus diri idealan kaj praktikan.

La politika tasko estis la liberigo de iuj teritorioj de iliaj loĝantoj, por ekposedi sendivide tiujn teritoriojn kun ilia natura kaj kultura riĉaĵo. La ekonomia tasko estis, ke la realigo de tiu intenco ne nur alportu nenian domaĝon, kaŭzu nenian kostojn, sed kontraŭe: ke ĝi fariĝu samtempe fonto, el kiu oni povas tiri profitojn – unue en formo de laboro plenumata de la malliberuloj por fabrikoj de milita industrio, due en naturo, tio estas en la havaĵo proprigita post la mortintoj.

Aranĝo tiel pripensita kaj realigita estis la verko de homoj. Ili estis ĝiaj plenumantoj kaj ĝia objekto. Homoj al homoj preparis tiun ci sorton.

Kiaj estis tiuj ĉi homoj?

Antaŭ la Komisiono por Esplorado de Germanaj Krimoj preterŝoviĝis aro da iamaj koncentrejaj malliberuloj, savitaj de la morto kontraŭ ĉia espero. Estis inter ili homoj de scienco, politikistoj, kuracistoj, profesoroj, estantaj fiero de siaj nacioj.

Ĉiu el ili saviĝis sola el inter siaj plejproksimuloj, ĉiu eksciis pri la morto de siaj gepatroj, sia edzino aŭ infanoj. Ili saviĝis, tute ne esperante tion.

Doktoro Mansfeld, profesoro de la universitato en Budapeŝto, diris: "Nur tial mi povis travivi tion, ke mi ne kredis la saviĝon eĉ por unu momento. Se mi donus min al iluzioj, mi ne havus tiun moralan trankvilon, kiu konservis min vivanta."

Tasko de tiuj homoj en la koncentrejo estis helpado al aliaj tiam, kiam ili mem ĉiutage tuŝiĝadis kun la morto, kiam egale kun aliaj ili estis submetataj al ĉiuj variaĵoj de turmentado. Kiel kuracistoj ili estis necesaj al la germanoj en la koncentrejo, tio donis al ili certajn eblecojn savi iliajn viktimojn.

Tiel doktoro Grabczyński el Krakovo, ekdeĵorinte en la koncentreja barako nro 22, loko de murdo kaj teruro por malsanuloj direktitaj tien por la "fintraktado", transformis ĝin en veran malsanulejon. Li ne nur zorge flegis ilin kiel kuracisto, ne nur elpetis por ili medikamentojn kaj bandaĝojn, sed artifice ŝirmis grave malsanajn kontraŭ gasmortigo, savis ilian vivon, certigante, ke post kvin tagoj ili estos sanaj.

Sed eĉ tiuj, kiuj per propraj manoj plenumadis tiun precizan planon de murdo kaj rabo, estis ankaŭ homoj. Kaj homoj estis tiuj, kiuj plivastigis la kadrojn de crdonoj, kiuj murdis transpasante la difinitan normon pro amatoreco.

Post bonegaj pro plastikeco atestoj de la konfesoj de deputito Mayer, kiu dekdu jarojn de sia vivo pasigis en germanaj koncentrejoj, ni havas ideon, kiel aspektis la fimortigistoj el Oświęcim.

La piej granda krimulo en la koncentrejo estis August Glass, malsvelta kaj muskolforta, promenanta ĉiutage tra la koncentreja barakaro per balanca paŝo de atleto. Tiu ĉi batis elektitajn viktimojn en la renojn tiamaniere, ke ne restu postsignoj, kaj la morto sekvu post tri tagoj.

Alia starigadis sian piedon sur la gorĝo de la homo kaj frakasis lian laringon per sia pezo.

Alia subakvigadis la kapon de malliberulo en kuvon, tiel longe tenante lin, ĝis la malfeliĉulo sufokiĝis.

Unu el la piej sangavidaj koncentrejaj barakestroj, profesia krimulo, estis tre postulema ĉe la raporto kaj pro nepreciza purigo de vesto aŭ ŝuoj frapis per gumo, kun plumba finaĵo, al la kapo tiel trafite, ke mortigis surloke. Al li estis grave, ke dumtage li havu dekkvin mortigitojn.

Ankoraŭ alia, du metrojn alta, kun longa nazo, longa vizaĝo kaj mallargaj okuloj, kun laringo moviĝanta sur kolo, kun tre longaj manoj – ĉiutage per tiuj manoj sufokis antaŭ matenmanĝo kelkajn malliberulojn, elektante ilin por si laŭ prefero en diversaj koncentrejaj barakoj dum

matena promeno.

Sendube tiuj estis homoj, kiuj povis tion fari, sed ne devis tion fari. Tamen oni faris Mon, por eligi el ili kaj movigi tiujn fortojn, kiuj dormetas en la subkonscio de homo kaj kiuj – ne vekitaj – povus neniam ricevi la okazon por ekago.

Eksterordinare zorgema selekto kaj bone pripensitaj edukaj sistemoj liveris tiun en historio unikan homan socion, kiu ludis la al si destinitan rolon ĝis la fino.

Laŭ la atestoj de la deputito Mayer, ni scias, ke en la komenca stadio ia partio de Hitler pligrandigadis sian aktivularon, varbante adeptojn el inter socia ŝaŭmo. Tie estis krimuloj, murdistoj kaj ŝtelistoj, estis prostituistoj. La nazia edukado speciale protektis iliajn denaskajn instinktojn. Pri tio atestas en Germanujo eldonita speciala leĝo, malpermesanta al iu ajn riproĉi al partianoj ilian personan pasintecon. Multaj homoj pro transpaso de tiu malpermeso restadis en malliberejoj.

Laŭ la atestoj de psikiatria profesoro en Praha, doktoro Fischer, en specialaj kursoj, ofte dujaraj, kie oni instruis hitleranan junularon, okazadis praktikaj ekzercoj de sadisma krueleco.

Tiu ĉi profesoro Fischer, multjara juĝeja eksperto, asertas, ke la sadismo ne malgrandigas la respondecon de la krimuloj eĉ en piej eta grado. Ĉiuj ili estas homoj konsciaj pri siaj agoj kaj plene respondaj pri ili.

La infanoj en Oświęcim sciis, ke ili estas mortontaj. Por sufoki en la gaso oni elektadis malpli grandajn, ne taŭgajn ankoraŭ al laboro. Oni faris la selekton tiamaniere, ke la infanoj devis laŭvice subiri sub bastonon en alteco de unu metro kaj dudek centimetroj. Konsciaj pri la graveco de la momento, la malpli grandaj, proksimiĝante al la bastono, rektiĝis, paŝadis streĉitaj sur piedfingroj, por tuŝi per la kapo la bastonon kaj gajni la vivon.

Ĉirkaŭ 600 infanojn, destinitajn por sufoko, oni tenis malliberaj, ne havante ankoraŭ kompletan necesan por plenigo de la kamero. Ili ankaŭ sciis, pri kio temas. Ili diskutadis tra la koncentrejo kaj kaŝiĝis, tamen SS-viroj repeladis ilin al la barako. Oni povis aŭdi de malproksime, kiel ili ploris kaj vokis pri savo.

– Ni ne volas al la gaso! Ni volas vivi!

Al unu el la doktoroj oni ekfrapis nokte al la fenestro de lia kuracista ĉambreto. Kiam li malfermis, du knaboj eniris tute nudaj, rigidiĝintaj en frosto. Unu estis dekdu, la alia dekkvarjara. Ili sukcesis forkuri de la aŭtomobilo en la momento, kiam ĝi alveturis la gaskameron. La kuracisto kaŝis la knabojn ĉe si, nutris ilin, akiris por ili vestojn. Fidindan homon ĉe la kremaciejo li decidigis, ke tiu ĉi kvitanco la ricevon de du kadavroj pli, ol li ricevis. Riskante ĉiumomente sian vivon, li konservis ĉe si la knabojn ĝis la tempo, kiam ili ree povis aperi en la tendaro ne vekante suspekton.

Doktoro Epstein, profesoro el Praha, trairante la straton inter la barakaro de la koncentrejo en Oświęcim dum serena somera mateno, rimarkis du malgrandajn infanojn ankoraŭ vivajn. Ili sidis en la sablo de la vojo kaj preterŝovadis sur ĝi iajn bastonetojn. Li haltis ĉe ili kaj demandis:

Kion vi faras tie, infanoj? Kaj li ricevis la respondon:

Ni ludas bruligadon de judoj.

Printempo – somero 1945

KLARIGOJ

folksdojĉ – Volksdeutscher: titolo donita de hitlera reĝimo dum la okupado al polaj ŝtatanoj germandevenaj, donanta al ili gravajn avantaĝojn kompare al la pola loĝantaro

Majdanek, Treblinka, Oświęcim (Oŝvienĉim) – koncentrejoj sur pola tero konataj pro tie praktikata ekstermado. Sole en Oświęcim (germane Auschwitz) oni mortigis pli ol 4 milionojn da homoj el multaj landoj okupitaj de la germanoj. Nun troviĝas tie muzeo.

mariavitino – anino de kristana sekto en Polujo

Pawiak-malliberejo – granda malliberejo en Varsovio, kie la hitleranoj turmentis kaj mortigis multege da homoj

Praga – kvartalo de Varsovio sur la dekstra bordo de la Vistulo

preparatoro – funkciulo ĉe altlernejoj kaj sciencaj institutoj; lia tasko estas fari preparatojn (preparaĵojn).

Pruszków (Pruŝkuv)– urbo proksima al Varsovio; troviĝis tie tendaro, al kiu la germanoj transportis post malsukcesinta varsovia ribelo la varsovian loĝantaron

vojevodio – teritoria, administra unuo de Polujo